


# KATALUNA ESPERANTISTO

Llengua internacional i drets lingüístics

NÚMERO 373 (núm. 5 de la 6a època) JUNY/JUNIO 2023

MARO ESTAS GUTARO



**Maŝina tradukado  
kaj Esperanto  
Traducciono automática  
i esperanto**

Redaktora saluto..... 3

**MAŜINA TRADUKADO KAJ ESPERANTO  
TRADUCCIÓ AUTOMÁTICA I ESPERANTO**

Maŝina tradukado kaj esperanto ..... 4  
 Tradukantaj komputiloj..... 7  
 TraduCCIó automàtica i diversitat lingüística ..... 10  
 Maŝintradukado kaj lingva diverseco..... 11  
 Ĉu aŭtomata tradukado iam igos esperanton sencela?..... 16  
 Siru Laine: “Tradukiloj ne rimarkas sarkasmon aŭ tonon” ..... 19

**LITERATURO/LITERATURA**

Lastatempaj romanoj, de Romio ĝis dissplitiĝo de Sovetio ..... 23  
 La nepoj nin benos..... 26  
 Poezia angulo. Una paraula que ha romàs gravada ..... 27  
 Havanaj ombroj ..... 28

**HISTORIO/MEMORO - HISTÒRIA/MEMÒRIA**

Un viatge per l’Abya Yala ..... 31  
 Ekziliĝi por eviti malliberejon..... 33  
 100 jarojn antaŭe. Congrès d’esperantistes ibèrics ..... 34  
 Memoro pri Maria Garés i Coll..... 35

**NIA AGADO - LES NOSTRS ENTITATS**

La diada esperantista de 2023, una celebració doble..... 36  
 Zamenhofa Tago 2022 a Gràcia ..... 38  
 Sabadell, seu de la 10a edició dels *KER-ekzamenoj* ..... 39  
 Esperanto, plurlingvismo kaj sociaj movadoj en la longa 20a jarcento... 40  
 Kataluna Esperanto-Junularo ravas:  
 La RenKEJtiĝo, sukcesa aranĝo en Katalunio..... 41  
 Rellu a la presidència de KEJ..... 42  
 Lasta agado de KEJ..... 44

**RACÓ DE L’APRENENT - ANGULO POR ETERNAJ KOMENCANTOJ**

Angulo por eternaj komencantoj..... 46

**VILAĜO ESPERANTO**

Poezio..... 47



Foto de la portada - foto de la kovrilo:  
 Stock-Asso / Shutterstock.com

*Kataluna Esperantisto* és una publicació semestral en català i esperanto de l’Associació Catalana d’Esperanto sobre els drets lingüístics, les llengües de relació internacional, les llengües minoritzades i la història i actualitat de l’esperanto i de les llengües planificades.  
 revuo-ke@esperanto.cat

Edita: Associació Catalana d’Esperanto  
 Apartat 1008 - 08204 Sabadell  
 Papa Pius XI, 130 - 08208 Sabadell  
 www.esperanto.cat  
 info@esperanto.cat

Consell de redacció: Pere Fornells, Elisabet Abeyà, Xavier Alcalde, Nicolau Dols, Xavier Margais, Pedro Martín Burutxaga, Òscar Puig, Alfons Tur, Carles Vela, Sandra Vives

Assessorament lingüístic: Hèctor Alòs (esperanto), Anna Maria Muñoz (català)

Composició: Ferriol Macip i Bonet

ISSN de l’edició en paper: 2014-8364

ISSN de l’edició electrònica: 2014-8372

Dipòsit legal: B-27362-1982

**ASSOCIACIÓ CATALANA D’ESPERANTO  
KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO**

President/Prezidanto: Òscar Puig  
 Vicepresidenta /Vicprezidanto: Sandra Vives,  
 Secretària/Sekretario: Maria Sánchez,  
 Tresorera/Kasisto: Clara Casanovas -  
 Vocals/Voĉdonantoj: Alfons Tur, Carles Vela,  
 Enric Pineda, Ferriol Macip, Lluís de Gibert,  
 Mon Cardona, Sebastià Ribes, Sílvia Soler,  
 Representant/Representanto de KEJ:  
 Jordi Calafi

**JOVENTUT CATALANA D’ESPERANTO/  
KATALUNA ESPERANTO-JUNULARO**

President/Prezidanto: Jordi Calafi,  
 Vicepresidenta - Vicprezidanto: Siru Laine, 2n  
 Vicepresident /2a Vicprezidanto: David Ruiz,  
 Tresorer/Kasisto: Pol Jiménez,  
 Secretari General/Ĝenerala Sekretario:  
 Jordi Solsona, Representant a TEJO/  
 Komitatano A en TEJO: Òscar Hernández,  
 Xarxes socials / Sociaj retejoj: Lucía M.  
 Fernández.

Pri la enhavo de la kontribuoj responsas la aŭtoroj mem. Nur la redaktora saluto esprimas opiniojn de la eldonisto KEA. Els autors que signen els articles són els responsables dels seus continguts. L’opinió de KEA només s’expressa a través de l’editorial

Tots els articles estan subjectes a llicència Creative Commons Reconeixement-NoComercial-SenseObraDerivada 2.5 (<http://creativecommons.org/licenses/by-nc-nd/2.5/es/legalcode.ca>). Està permès de reproduir-los i distribuir-los, sempre que es faci sense afany de lucre i se’n reconegui explícitament els autors, i l’Associació Catalana d’Esperanto com a editora

Imprès a: Recordgraf, C/ Mandoni, 6  
 08004 Barcelona

---

# REDAKTORA SALUTO



Pere Fornells

**A**vui dia els avenços en tots els aspectes de la computació estan provocant grans canvis en les relacions i comunicacions entre les llengües. Com a esperantistes aquest és un tema que ens toca i ens ha semblat interessant reflexionar-hi. Com que els canvis són cada vegada més ràpids, ves a saber si en el temps que va del tancament de l'edició fins que la revista arriba a les vostres llars ens hem quedat ja una mica obsolets. Fins i tot si és així, valdrà la pena. Els espais de mastegar les idees que s'allunyen de la immediatesa són, probablement, més necessaris que mai.

Fa un any recuperàvem la tipografia modernista de la capçalera de la revista, ara recuperem la nostra divisa de sempre, “maro estas gutaro”. A més de ser un ús de l'esperanto molt bonic, la divisa ens arrela en la nostra tradició i ens recorda, al meu entendre, que com a persones i com a grup tenim la nostra part de responsabilitat i l'hem d'entomar tan bé com sapiguem.

Ens fa molta il·lusió, en el centenari del naixement de l'Anna Rosselló, tenir una col·laboració externa on veiem com la seva història segueix sent inspiradora.

Fa poc hi va haver un relleu a la presidència de KEJ. Ens ha semblat adient que, a més de l'espai habitual on el nostre jovent ens explica les seves activitats, els presidents sortint i entrant tinguessin un petit racó per dir-nos unes paraules.

Una novetat d'aquest número és el petit relat «Havanaj ombroj». Si anem rebent més textos breus en esperanto, en podríem anar publicant i tindríem una secció de «verkoj». Ens els podeu enviar mitjançant la nostra nova adreça, [revuo\\_ke@esperanto.cat](mailto:revuo_ke@esperanto.cat), on també ens podeu fer arribar propostes, suggeriments, comentaris, etc.

Per acabar, vull agrair la feina feta a tot l'equip que ha fet possible aquest Kataluna Esperantisto, amb moltes col·laboracions de vegades poc visibles però sovint imprescindibles. Especialment vull mencionar l'Elisabet, el Xavier i la Montserrat, que m'han precedit en aquesta columna i han posat les bases d'aquesta etapa del Kataluna Esperantisto. Moltes gràcies. ■

**N**untempe novaj atingoj pri ĉiaj fakoj de komputado ege ŝanĝas la rilaton kaj komunikadon inter lingvoj. Kiel esperantistoj, tiu temo rilatas al ni kaj ni taksis interese pridiskuti ĝin. Ĉar ŝanĝoj rapidiĝas eble, de kiam ni kompletigos la enhavon de la revuo ĝis kiam ĝi atingos viajn hejmojn, tiu ĉi numero jam estos eĉ iom “antikva”. Eĉ tiel indos. Anguloj por maĉi kaj remaĉi ideojn malproksime de la tujeco estas, verŝajne, pli bezonataj ol iam ajn.

Antaŭ unu jaro ni rehavigis la modernismajn literojn de nia titolo. Nun ni rehavigas nian tradician sloganon, “maro estas gutaro”. Ĝi estas tre bela esperantaĵo kaj enradikigas nin en nian tradicion. Krome, laŭ mia kompreno, ĝi memorigas nin, ke persone kaj grupe ni havas nian respondecon, kiun ni devas akcepti kaj plenumi kiel eble plej bone, laŭ nia kapablo.

En la centjara datreveno de la naskiĝo de Anna Rosselló, ni tre ĝojas havi eksteran kunlaboron kiu montras, ke ŝia vivsperto ankoraŭ inspiras homojn.

Antaŭnelonge okazis transdono de la stafeto en la prezidanteco de KEJ. Ni taksis interese, aldone al la kurtima spaco kie nia junularo raportas pri sia agado, rezervi angulon por opinioj kaj de la prezidinto kaj de la nova prezidanto.

Novajaĵo de tiu ĉi numero estas la verketo “Havanaj ombroj”. Se ni plie ricevos tiajn mallongajn tekstojn en esperanto, ni povos publikigi ilin kaj tiel ni havus rubrikon pri “verkoj”. Vi povas sendi viajn tekstojn al nia nova redadreso, [revuo\\_ke@esperanto.cat](mailto:revuo_ke@esperanto.cat), al kiu vi ankaŭ povas skribi al ni sugestojn, proponojn, komentojn ktp.

Finfine, mi volas danki la tutan teamon pro ilia laboro, kiu ebligis tiun *Katalunan Esperantiston* per iliaj multaj kunlaboraĵoj, kelkfoje ne tre videblaj sed ofte nepraj. Kaj mi volas speciale mencii Elisabet, Xavier kaj Montserrat, kiuj antaŭis min en tiu ĉi rubriko kaj starigis la fundamentojn de tiu ĉi epoko de *Kataluna Esperantisto*. Koran dankon. ■



# MAŜINA TRADUKADO KAJ ESPERANTO

**Mikel L. Forcada**

Universitat d'Alacant kaj Prompsit Language Engineering

**M**aŝina tradukado (MT ankaŭ *maŝintradukado*) estas procezo per kiu komputila sistemo (tio estas, unu aŭ pluraj komputiloj, kiuj rulas la necesan programaron) prenas tekstan dokumenton en la fontlingvo kaj generas tekstan dokumenton en la cellingvo, kiu povas esti konsiderata, ideale, kiel *kruda traduko* de la originalo. Kutime, la rezulto de la maŝina tradukado ne estas interŝanĝebla kun profesia traduko, sed ĝi povas esti utila, kiel ni vidos nun.

**La aplikoj de la MT** povas esti dividitaj en du grandajn grupojn kiuj estas kutime nomitaj *asimilado* kaj *disvastigado*. La termino *asimilado* indikas uzojn de MT por ke cel-

lingvuloj komprenu dokumentojn skribitajn en fontlingvo, kiun ili ne komprenas. Ideale, la maŝina tradukado por asimilado estu rapida, fidela al la enhavo, kaj komprenebla, eĉ se ĝi ne estas gramatike ĝusta; homoj estas relative toleremaj pri devioj de gramatikeco (ni bone komprenas frazojn kiel \*“Reprezentantoj de partioj malkonfida movo kontraŭ ĉefa ministro prezentis hieraŭ”). La uzoj de *disvastigado* estas rilataj al la publikigo de tradukitaj tekstoj; tial, ju malpli da ŝanĝoj devas esti faritaj al la kruda traduko por generi tradukon taŭgan por publikigo —tio estas, ju malpli korektado (*postredaktado*) necesas— des pli bone. Indas rimarki ke, nuntempe, la uzoj de asimilado multe superas tiujn de disvastigo.

La **du ĉefaj teknologioj de MT** estas MT bazita sur reguloj kaj MT bazita sur korpusoj.

La **sistemoj de MT bazitaj sur reguloj** (MTBR) estas formitaj de *motoro* (komputila programo, pli-malpli sendependa de la lingvoj) kaj *lingvaj datumoj*: gramatikaj reguloj por la transformo de strukturoj de la fontlingvo en strukturojn de la cellingvo, du unulingvaj vortaroj kiuj priskribas la morfologion de ambaŭ lingvoj, kaj dulingva vortaro kiuj establas la vortajn samvalorecojn. Grava aspekto de maŝina tradukado bazita sur reguloj estas ke la lingva scio kodita en reguloj kaj vortaroj fakte konsistigas *komputilan priskribon* de ambaŭ lingvoj kaj de ilia reciproka rilato; priskribo,



kiu cetere estas rulebla kaj reuzebla por krei aliajn lingvajn teknologiojn. Sistemoj de MTBR kutime ne postulas specialigitan aŭ aparte potencajn komputilojn. La platformo libera (aŭ *de fontoj malfermaj*) de MT Apertium ([apertium.org](http://apertium.org)) estas ekzemplo de ĉi tiu aliro, kiu funkcias pli bone por rilataj lingvoj kaj ne postulas tre potencajn komputilojn; Apertium konservas kaj publikigas ĉi tiujn komputilajn priskribojn sub liberaj permesiloj, kiuj ebligas al ĉiuj uzi kaj plibonigi ilin, kaj favoras la kreadon de komunumo ĉirkaŭ ĝi.

La **sistemoj de MT bazitaj sur korpusoj** (MTBK) uzas komputilan programon por lerni *tradukmodelojn* el grandaj paralelaj korpusoj, kie centoj da miloj aŭ milionoj da frazoj en unu lingvo estis vicigitaj kun la responda frazo en la alia lingvo.

Poste, alia komputila programo uzas tiun tradukmodelon por traduki novajn frazojn. Estas du ĉefaj aliroj al la MTBK: *statistika* maŝina tradukado kaj *neŭra maŝina tradukado*. Ĉi-lastata estas *la stato de la arto* ekde proksimume 2015.

La **neŭraj sistemoj de maŝina tradukado** (NMT) estas bazitaj sur *artefaritaj neŭraj retoj*, komputilaj modeloj, kiuj simulas retajn strukturojn de interligitaj unuoj, kiuj estas simpligo de bestaj neŭronoj. Tiuj retoj ricevas enigajojn kaj produktas eligajojn kiuj dependas precize de la maniero kiel la artefaritaj neŭronoj estas interligitaj. Nuntempaj sistemoj de NMT skribas la tradukon unu vorton samtempe, de maldekstre al dekstre, uzante prognozan mekanismon, similan al tiu disponebla en la klavaroj de

”

Esperantistoj povas decidi rekte publikigi sian tutan tekstan enhavon nur en esperanto, ĉar uzantoj de aliaj lingvoj povas uzi MT por legi kaj kompreni ĝin

la saĝtelefonoj. Sur via saĝtelefono, la vortoj antaŭdiritaj dependas de la antaŭaj vortoj, kiujn vi skribis; en la NMT, ĉiu celvorto en la traduko dependas, ne nur de la celvortoj jam firmigitaj maldekstre, sed ankaŭ de ĉiuj vortoj en la fontfrazo. Neŭraj komputilaj modeloj estas matematike tre kompleksaj. Ilia trejnado (por kiu necesas grandaj paralelaj korpusoj) kaj ilia posta rulado postulas intensajn kalkulojn kun *vektoroj* kaj *matricoj*, kiuj postulas potencajn kaj specialigitajn komputilojn, kiuj uzas multe da elektra energio kaj ne estas normale disponeblaj por ĉiuj. Famaj sistemoj de NMT estas *Google Translate* kaj *DeepL*. Bedaŭrinde, la korpusoj, kiujn ili uzas, ne estas publikaj kaj ne povas esti uzataj de iu ajn alia. Sed feliĉe, se oni havas la komputan potencon por trejni sistemojn de NMT, oni povas trovi publike disponeblajn korpusojn por multaj lingvoj en lokoj kiel OPUS (opus.nlpl.eu). Oni povas ankaŭ elŝuti *antaŭtrejnitajn* modelojn de NMT por multaj lingvoj el lokoj kiel Hugging Face (huggingface.co) kaj facile ruli ilin en komputiloj kiuj ne estas tiom potencaj.

**Aliaj neŭraj sistemoj, kiuj ankaŭ povas traduki tekstojn.** Lastatempe, alia sistemo bazita sur artefaritaj neŭraj retoj, ChatGPT (<https://chat.openai.com/chat>), fariĝis tre populara. Ĝi estas sistemo, kiu “inteligente interparolas” en multaj lingvoj kaj al kiu ni povas peti interalie traduki tekstojn. Eblas, ke, estontece, sistemoj kiuj kapablas prilabori tekstojn kaj traduki, kiel ChatGPT, estos uzataj por traduki anstataŭ specialigitaj sistemoj de maŝina tradukado. Sed oni devas konsideri, ke sistemoj kiel ChatGPT estas privataj, tre grandaj

sistemoj, kiuj povas esti instalitaj nur sur tre potencaj komputiloj.

**Ĉefaj avantaĝoj de la MT por esperanto:** Granda parto de la nuna vicleco de esperanto venas de ĝia ĉeesto interrete. Esperanto, kiel aliaj *malgrandaj lingvoj* povas profiti de la MT en ambaŭ uzogrupoj difinitaj supre. Unuflanke, la komunumo de esperantistoj povas decidi rekte publikigi sian tutan tekstan enhavon nur en esperanto, ĉar uzantoj de aliaj lingvoj povas uzi MT por legi kaj kompreni ĝin (asimilado). Aliflanke, MT povas esti uzata por helpi generi novan tekstan enhavon en esperanto el tekstoj en aliaj lingvoj surbaze de la rezulto de ĝia MT (disvastigo).

**Maŝina tradukado bazita sur reguloj por esperanto en Apertium:** La disvolvo de la platformo de libera maŝina tradukado Apertium komenciĝis en 2004 per lingvoj kiel la hispana, la kataluna aŭ la galega, sed tre frue (en 2007), kataluna firmao ABC Enciklopedioj kontraktis la grupon de profesorino Núria Bel ĉe la Universitato Pompeu Fabra por konstrui sistemojn por kataluna–esperanto kaj hispana–esperanto. Tio puŝis al la ekuzo de Unicode (aŭ *Unikodo*), kiu ne estis ankoraŭ subtenata en Apertium sed estis bezonata por skribi esperanton. Poste, esperantistoj Jacob Nordfalk (el Danio) kaj Hèctor Alòs i Font (el Katalunio, sed loĝanta en Ĉuvaŝio) aliĝis al la projekto kaj komencis disvolvi sistemon por esperanto–angla kaj plibonigi la sistemojn por esperanto–kataluna kaj esperanto–hispana. Por esperanto–angla, necesis modifi la motoron ĉar la reguloj bezonataj por la tradukado al esperanto estis pli kom-

pleksaj; ĉi tio ebligis ke novaj lingvoj estu procezitaj en la platformo. Eĉ se nunaj sistemoj de NMT produktas pli naturajn tradukojn, la ĉefa avantaĝo de disvolvo de sistemoj bazitaj sur reguloj estas generado de vortaroj kaj gramatikaj reguloj por esperanto, kiuj povas esti uzataj por disvolvi aliajn lingvajn teknologiojn por tiu lingvo. Lingva teknologio kiu profitis de tio estis LanguageTool (language-tool.org), libera gramatika korektilo por multaj lingvoj, inter kiuj esperanto. Ĉiu ajn esperantisto povas akiri la necesajn sciojn kaj plibonigi la ekzistantajn datumojn por esperanto en la platformo Apertium.

**Neŭra maŝina tradukado por esperanto:** Oni povas uzi senpagan NMT por esperanto en interreto; ekzemple, estas *Google Translate*, kaj la korpusoj uzitaj por trejni ĝin ne estas publikaj nek malfermitaj. La ĉi-supre menciita sistemo ChatGPT—ankaŭ privata kaj fermita—povas interparoli en esperanto kaj oni povas peti al ĝi tradukojn inter esperanto kaj aliaj lingvoj, sed oni ne povas ĝin elŝuti kaj funkciigi ĝin en normaj komputiloj. Feliĉe, estas malfermitaj korpusoj por esperanto en OPUS (menciita supre); ekzemple, estas 20 milionoj da frazparoj por esperanto kaj la angla. Estas ankaŭ publikaj antaŭtrejnitaj modeloj por esperanto en Hugging Face, kiel ekzemple por esperanto–angla (<https://huggingface.co/Helsinki-NLP/opus-mt-eo-en>) kaj inverse, kaj ankaŭ por aliaj 43 lingvoparoj. Ne estas malfacile uzi tiujn modelojn en malgrandaj komputiloj; necesas instali la programbibliotekon *transformers*. OPUS ankaŭ eldonas antaŭtrejnitajn modelojn kiuj povas esti uzataj en programoj de tradukado helpata de komputilo. ■



Babilu ankaŭ vi en la grupo de KEA en telegramo

Por asocioj, simpatiantoj kaj scivolemuloj

<http://telegram.esperanto.cat>

# TRADUKANTAJ KOMPUTILOJ — ĈU POR PLI JUSTA MONDO?

**Klaus Schubert**

Interlingvisto kaj profesoro pri aplika lingvistiko



## ĈU ĈIO SENPAGE?

En mia poŝtelefono troviĝas senpaga apo, kiu tradukas kaj interpretas en 19 lingvoj. Oni povas enigi la tekston tajpe aŭ fote aŭ parole kaj la tradukaĵo venas kaj skribe kaj aŭtomatavoĉe. Ĉu do nuntempe translingvigo estas senkosta? Ĉu junuloj evitu studi tradukadon kaj interpretadon? Ĉu entreprenoj en siaj internaciaj projektoj ĉesu buĝeti lingvokostojn? Ŝajnas ja esti tekniko facile funkcia. Simpla klako, kaj jen do!

Ni rigardu pli proksime, kaj ni demandu pli zorge. Al kiu utilas tia facile disponebla tradukado? Ĉu nun ĉiuj lingvoj fariĝas samrajtaj? Ĉu ni interparolos kun kiu ajn alia homo sen peno kaj sen baro? Ĉu ni vivos en pli bona mondo, se nur ni aĉetos la ĝustan poŝtelefonon?

## IOMETE DA HISTORIO

Transponti la lingvajn barojn inter la popoloj estas malnova revo de la homaro. Iuj pensis pri internaciaj planlingvoj, aliaj imagis aparatojn. Teknikaj planoj aperis jam dum la epoko de klerismo. En 1933 Francio kaj Sovetunio asignis po unu patenton pri mekanika tradukilo. Ekzistas malklaraj raportoj, laŭ kiuj ambaŭ inventintoj eble fakte prezentis funkciantan maŝinon. La soveta el ili, Smirnov-Trojanskij, ellaboris sistemon de sintaksa transformo, en kiu li uzis enhavajn morfemojn de la elira kaj la cela lingvoj kaj kiel interlingvaj sintaksajn rolindikilojn funkcimorfemojn de Esperanto. Ĉi ĉion oni nomas *mekanika tradukado*, kaj nur de kiam oni aplikas komputilojn, la termino estas *perkomputila* aŭ *maŝina tradukado*.

Perkomputila tradukado estas procezo, en kiu softvaro transigas skriban tekston el unu lingvo en alian. Ĝi ne nepre estas tutaŭtomata. Ja eblas, ke kunagas ankaŭ homo. Se la esenca paŝo, la transiro de la elira al la cela lingvo, estas realigata de la programo, do oni nomas la tuton perkomputila tradukado. Se tamen la tradukan paŝon realigas homo, dum preparajn kaj finajn paŝojn zorgas programo, tiukaze oni nomas la procezon komputile helpata tradukado.

Post invento de la komputilo en la 1940aj jaroj unu el la plej fruaj ideoj, por kio krom kalkulado uzi la novajn ilojn estis tradukado. La evoluo progresis limake. Komence oni kredis, ke sufiĉas transmeti vortojn; rezultis aŭtomata vortaro, sed ne traduko de tekstoj. Por uzi vortaron, necesas redukti la nombrajn, kazajn,



tensajn ktp. vortformojn al unusola baza formo, necesas do uzi morfologion. Kaj por traduki frazojn necesas sintakso. Tiun staton oni atingis inter la 1960aj kaj la fino de la 1980aj jaroj. Tamen neniu homa lingvo estas tiel strikte regula, kiel taŭgus por programoj. Kaj neniu lingvo havas limigitan nombron da vortoj, tiel ke ne eblas fari vere kompletan vortaron. Do senĉese necesis homa laboro por flegi la tradukprogramojn kaj la vortarojn.

En la 1980aj jaroj aperis la ideo rezigni pri ĉia scio pri lingvo, gramatiko ktp. kaj anstataŭe programe analizigi paralelajn tekstojn tradukitajn de homoj kaj el tio statistike kalkuli kiel traduki novajn frazojn. Samkiel en la pli fruaj sistemoj, la tradukado okazis frazope, kaj malfacilis el la izolitaj frazoj ricevi koheran kaj senchavan tekston. En Esperantujo oni memoras la projekton DLT de nederlanda programarentrepreno (de 1984 ĝis 1990). Tekniko ĝi troviĝis ĉe la sojlo inter la gramatika kaj la statistika metodo. Dum oni komence modifis Esperanton, por ke ĝi plej senambigue funkcii kiel dumproceza interlingvo neniam legata de homoj, post apero de la statistika aliro oni reiris al normala Esperanto, ĉar nur en tiu lingvo haveblas la tekstamasoj bezonataj por la statistikumado.

Plua evoluigo ebligis traduki surbaze de statistika analizo de tekstoj en ambaŭ lingvoj, kiuj ne plu bezonis esti paralelaj tradukoj unuj de la aliaj.

## NUNA STATO

Nuntempe ŝosas tradukiloj uzantaj artefaritan intelekton. Esence ilia baza tekniko estas simila al la statistikaj sistemoj. Necesas trovi eblajn tradukojn kaj funkciigi decidadon por el ili elekti unu, ripetante tiun metodon sur ĉiuj niveloj, do pri morfemo, vorto, sintagmo, frazo kaj, ankoraŭ nun plej malfacile, pri la transfraza, la teksta nivelo. La artefarita intelekto ĉefe agas en la decidado kaj por tion fari en la komparado kaj pesado de kuntekstoj en la analizataj

tekstamasoj. La hodiaŭaj teknikoj estas multe pli fajne ellaboritaj ol la iamaj statistikaj, sed ankaŭ nuntempe pluvalidas la diagnozo de la 1950aj jaroj, laŭ kiu maleblas tutaŭtomata altkvalita traduko de ajnaj tekstoj.

Sed ni ne kritiku tro: ja oni havas ŝancon ricevi tute bonajn tradukojn, kutime sen morfologiaj aŭ sintaksaj eraroj kaj ofte kun akceptebla teksta kohero.

## PRAKTIKA EKSPERIMENTO

Indus al vi ilustru la kvaliton de la artefaritintelektaj tradukiloj per la lingvoj kataluna kaj Esperanto. Tamen por tio mi ne estas kompetenta; provu mem. Mi tradukigis per la senpaga Google-tradukilo (<https://translate.google.com>) la unuajn ses alineojn de ĉi tiu artikolo, entute 936 vortojn, el Esperanto al kelkaj lingvoj, kiujn mi konas, do al la germana, la angla, la sveda kaj la rusa. Laŭ mia takso, mia elira teksto estas en flua proza lingvaĵo, sen apartaj lingvaj kapricoj aŭ vortludoj kaj kun milda nivelo de faklingvaĵo.

La rezultoj estas tute fluaj, morfologie kaj sintakse laŭregulaj tekstoj, tamen kun eraroj: La kunmetitaj vortoj *aŭtomatavoĉe* kaj *perkomputila* misfunkcias en ĉiuj cellingvoj, ĉi-lastaj precipe kie ĝi aperas la elipso. *Tradukantaj komputiloj* estas korekte tradukita nur al la angla. *Translingvigo*, vorto kiun mi elektis por inkluzivi kaj tradukadon kaj interpretadon, en ĉiuj lingvoj aperas kiel 'traduko'. *Planlingvo* ĉie fariĝas 'programlingvo'. En la germana malaperas la distingo inter *mekanika* kaj *maŝina traduko* kaj *kazajn* fariĝas 'uzado de majuskloj kaj minuskloj'. En ĉiuj lingvoj krom la rusa, *Trojanskij* fariĝas 'Trojansky'. Lingvistoj scias, ke en Esperanto, la germana kaj precipe en la rusa la frazelementoj ordiĝas ne laŭ fiksa skemo, sed laŭ noveco (komuna scio antaŭ novinformo, foje nomataj temao kaj remao). Tion neniu el la tradukoj obeas, tiel ke la teksta kohero ne ĉie estas glata, kelkloke iom misgvida.

Diagnozo: La traduko ŝajnas iri tra la angla kiel interlingvo. Nur tiufoje oni povas el *kaza* atingi la (ĉi tie malĝustan) signifon 'uzado de majuskloj kaj minuskloj'. Kaj el ĝi rezultas la angla vortordo en aliaj cellingvoj. Kie la elira lingvaĵo fariĝas iomete pli komplikita, kun facila elipso aŭ simpla kunmetita vorto, tuj tie misfunkcias la traduko. Kie mi kontraŭmetas du fakvortojn, en la germana traduko ili kunfandiĝas. La tradukado ŝajnas okazi frazope, samkiel en la 1950aj jaroj, do sen taŭga tekstkohero.

Ĉu eble mia eksperimento estas maltaŭga, ĉar Esperanto estas tro nekutima elirilingvo? Mi do provis traduki simplan teknikan tekston el la angla en la germanan, ĉi-foje per DeepL ([www.deepl.com](http://www.deepl.com)). La teksto estis instrukcio pri presmaŝino kiu presas sur io, kio en la angla nomiĝas *sheet*. En la germana en ĉiu dua frazo *sheet* fariĝis 'Bogen', do 'paperfolio' (la ĝusta traduko), sed en la aliaj frazoj aperis 'Blech', do 'metalfolio'. Diagnozo: La traduko okazis frazope, sen ke la artefarita intelekto farus decidon por la tuta teksto. Laŭdire artefarita intelekto utiligas scion. Ĉi-tekste tamen ĝi ne uzis la scion enhavatan en la teksto, kie oni parolis pri papero, nek la ĝeneralan scion, ke oni kutime presas sur paperon kaj, se sur ion alian, oni tion nepre eksplice skribas.

## BONEGE, ĈU NE?

Sed tamen, ĉiu racia homo konstatus, ke la rezultoj estas bonegaj, kun iuj etaj eraretoj, pri kiuj mi sendube nur plendas por defendi malmodiĝintan profesion. Ĉu?

En profesia tradukista praktiko oni klasas erarojn ne kiel en la lernejo. Oni distingas erarojn laŭ la kvanto de laboro necesa por korekti. Termina miso kiel 'programlingvo' anstataŭ 'planlingvo' estas facile korektebla per ŝanĝo de unu vorto dum la miskonfirmigita vortordo necesigas preskaŭ kompletan refaron. Aliflanke, kiel trovi terminan eraron? Por tio



necesas homo, kiu regas ambaŭ lingvojn kaj kiu aldone (tion nefakuloj emas preteratenti) majstras tradukadon. Por la korektado de maŝintradukitaj dokumentoj oni jam multe antaŭ la nuna artefaritintelekta generacio de tradukiloj kreis la profesion de postkorektistoj. Ilia laboro estas atentopostula, teda kaj malbone pagata kaj kutimas okazi sub tempopremo. Ĉu ne en nia nuna tempo eblas aŭtomatigi ankaŭ tiun laboron? Se tio eblas, la tradukilo jam ne farus la erarojn. Do korektado necesas ĝuste por tiuj kazoj, kiujn ne eblas solvi aŭtomate.

Sed ni ne cerbumu nur pri eraroj. Niaj etaj eksperimentoj estas tro malgrandaj por montri la ĝeneralan ecaron de la novaj tradukiloj. Esence ili baziĝas sur komparo inter la nuna tasko kaj amasego da storitaj tekstoj. La artefarita intelekto kontribuas al la decidado necesa por el la multegaj modeloj rapidege elekti la ĉi-fraze sekvindan. La fundamento de la tuto estas ekzistantaj tekstoj. El tio ni povas konkludi, ke la sistemo havas plej bonajn ŝancojn atingi altkvalitan tradukon, se la tradukotaĵo similas al jamaj tekstoj. La plej granda merkato de tradukado estas fakaj dokumentoj, kaj interne de tiu merkato la plej grava estas teknikaj dokumentoj. Inter ili estas tekstoj plene similaj al ĉio jam storita, ekzemple uzinstrukcioj de ĉiutagaj teknikajoj kiel kafe- maŝinoj aŭ poŝtelefonoj. Tamen la plej gravaj kaj plej ampleksaj tradukotaskoj koncernas konstruciajn dokumentarojn de novaj teknikaj produktoj kaj procezoj, verkitajn por interna kaj interentreprena uzo en la industrio. Tekstoj enhavantaj novajn propoziciojn pri novaj terminoj. Se tiajn tekstojn oni provas artefaritintelekte traduki el neangla lingvo en alian neanglan, ofte en la celteksto oni trovas netradukitajn frazerojn, anglajn vortojn kaj nekompletajn frazojn.

## BONEGE POR KIU?

La suma diagnozo do estas, ke oni ofertas tre bonegajn tradukojn, tamen kun eraroj ripareblaj nur fare de profesiuloj. Por kiu tiu oferto estas utila?

La senpaga apo sur mia poŝtelefono servas “nur” 19 lingvojn, ĉefe la grandajn.

Simile DeepL kun 31 lingvoj. Tamen Google listigas 130on da lingvoj, inter kiuj estas aro da minoritataj. Do fakte malgrandaj lingvokomunumoj ja havas avantaĝon de la novaj teknikoj. Por multaj el ili komputaj tradukiloj alirebliĝas unuafoje. Tio ja estas paŝeto al pli justa mondo. Tamen (vi jam kutimiĝis al la tamenoj en mia rezonado, ĉu ne?) restas la fakto, pruvata de la mondaj statistikoj, ke oni plej multe tradukas ĝuste el tiu lingvo, kiun plej multaj jam lernis, la angla. Perkomputila tradukado do ne kompensas, sed plifortigas la malekvilibron inter la lingvoj. Kaj por ke sukcesu traduko de grava teknika dokumento aŭ fama scienca libro al minoritata lingvo, la nunaj iloj premisas grandan kvanton da ekzistantaj tekstoj, prefere pri simila temo kaj nepre kun simila aŭ sama terminaro. Ankaŭ per tio ili ne kompensas, sed plifortigas la problemon.

La malnovaj gramatikaj tradukprogramoj de antaŭ la statistika epoko estas pli “demokrataj” en tiu senco, ke oni por ili ellaboris por ĉiu aliĝinta lingvo vortaron kaj gramatikon plus transirajn vortaron kaj gramatikon por definitaj elira aŭ cela lingvoj, kaj jen oni povis traduki sendepende de ĉu aŭ ne ekzistis grandkvanta tekstaro. Aliflanke la konstruado de tia sistemo estis tiel multekosta, ke oni kutime preferis servi la grandajn merkatojn ol la minoritatajn. Kaj la sistemoj postulis konstantan flegadon de la vortaroj kaj la gramatikoj fare de fakuloj.

## KONKLUDE

La malnovaj tradukiloj estis lingvistikaj solvoj specifaj por ĉiu partoprenanta lingvo, dum la novaj estas pure teknikaj solvoj aplikeblaj al ĉiuj ajn lingvoj. La malnovaj dependis de granda investo, la novaj de granda tekstaro.

La novaj tradukiloj donas pli da eblecoj ĝuste al malgrandaj lingvokomunumoj. Ilia kvalito tamen dependas de grandkvantaj tekstaroj. Ili do ne helpas al minoritataj lingvoj evolui, sed postkuras evoluon alimaniere spronitan. Paŝeto antaŭen do, sed ne ora miraklo. ■

”

Por la korektado de maŝintradukitaj dokumentoj oni jam multe antaŭ la nuna artefaritintelekta generacio de tradukiloj kreis la profesion de postkorektisto

”

La suma diagnozo do estas, ke oni ofertas tre bonegajn tradukojn, tamen kun eraroj ripareblaj nur fare de profesiuloj

”

Malgrandaj lingvokomunumoj ja havas avantaĝon de la novaj teknikoj

# TRADUCCIÓ AUTOMÀTICA I DIVERSITAT LINGÜÍSTICA

**Pere Comellas Casanova** (Grup d'Estudis de Llengües Amenaçades)

**Mònica Barrieras Angàs** (Grup d'Estudis de Llengües Amenaçades)



La traducció ha tingut i té un paper molt rellevant en la transferència cultural. En determinats àmbits és tan important que tendeix a ser com l'aire, transparent, invisible. Els grans relats humans gairebé sempre han circulat a través de la traducció, i això inclou des del conte que un marxant basc explicava en èuscar (o un ramader d'Ansó en aragonès) perquè l'havia sentit en bernès al mercat d'Auloron, fins a les múltiples traduccions de la Bíblia (a centenars de llengües), passant per la versió anglesa del Quixot que, segons

diuen, és la llavor de la novel·la en aquesta llengua. Tot això ha permès que tinguem la il·lusió que la traducció és horitzontal, que aconseguim superar les enormes desigualtats que hi ha entre les llengües (demogràfiques, econòmiques, polítiques, militars...) i les agermana.


El cas és, però, que potser sí que la traducció fa passes en aquesta direcció, però també en fa en la contrària. I de fet és un bon reflex d'aquestes desigualtats que voldríem llimar. Si ens fixem en la traducció de llibres, les

dades són molt clares: cap a la meitat dels traduïts al català, per exemple, venen de l'anglès, i més de nou de cada deu, ho són d'un grapatet molt petit de llengües europees que amplien ben poc el ventall: castellà (sí, sí, un bon percentatge), francès, alemany, italià, i ja força menys, rus o portuguès. Si, a més, anem als productes audiovisuals, l'embut encara és més gros. I no gens recíproc, és clar.

De quina manera, doncs, pot impactar en aquest panorama la irrupció

# MAŜINTRADUKADO KAJ LINGVA DIVERSECO

**Pere Comellas Casanova** (Stud-Grupo pri Minacataj Lingvoj)  
**Mònica Barrieras Angàs** (Stud-Grupo pri Minacataj Lingvoj)



**T**radukado grave rolis kaj rolas en la kultura transdono. En certaj sferoj ĝi estas tiel grava ke ĝi similas al la aero, travidebla, nevidebla. La gravaj homaj rakontoj preskaŭ ĉiam disvastiĝis pere de la tradukado, kaj tio inkludas ekde iu rakonto dirita de eŭska marĉandisto en la eŭska (aŭ paŝtisto el Ansó en la aragona) ĉar li aŭdis ĝin en la bearna en la bazaro de Auloron, ĝis la multnombraj tradukoj de la Biblio (al centoj da lingvoj), inkluzive la anglalingva traduko de la Kihoto kiu, onidire, estus la semo de la tiulingva roman-

arto. Ĉio ĉi permesis estigi la iluzion ke la traduko estas horizontala, ke ĝi sukcesas transsalti la enormajn mal-similecojn inter la diversaj lingvoj (demografiaj, ekonomiaj, politikaj, militaj, ktp.) kaj ilin fratigas.

La afero estas ke, tamen, eble tradukado iras tiudirekten, sed ankaŭ malen. Kaj fakte ĝi spegulas la malegalecon kiun ni volus limigi. Se ni atentis pri la librotradukado, la ciferoj tute klaras: proksimume la duono de la tradukoj en la katalunan venas el la angla, kaj pli ol naŭ el dek venas el

eta fasko de eŭropaj lingvoj kiuj mal-multe vastigas la palettron: hispana (jes ja, konsiderinda elcento), franca, germana, itala, kaj sufiĉe malpli, rusa aŭ portugala. Se, krome, ni rigardas al aŭdovidaj produktoj, la funelo eĉ plimallarĝiĝas. Kaj la afero tute ne reciprokas, memkompreneble.

Kiamaniere do, povas influi en tiu panoramo la apero de iloj ĉiam pli efikaj kaj kompetentaj kiel tiuj de la maŝintradukado? La fakto ke nuntempe tiu teknologio disponeblas en kiu ajn poŝtelefono, tabul- aŭ



d'eines cada vegada més eficients i eficaces com les de la traducció automàtica? El fet que ara com ara tinguem eines d'aquestes a l'abast, en qualsevol telèfon mòbil, tauleta o ordinador personal, ¿no hauria de suposar una democratització de l'accés a la informació i a l'entreteniment, en el sentit de poder-ho fer en la pròpia llengua, tingui molts o pocs parlants o més o menys poder polític? ¿No hauria de fer possible que qualsevol aplicació digital estigués disponible en qualsevol llengua? Fins i tot, ¿no podria cadascú agafar un text digital qualsevol —una recepta mèdica o una novella— i traduir-lo directament a la pròpia llengua?

### ALGUNES COSES BONES

Fins fa poc, un dels problemes evidents de la traducció automàtica era la mala qualitat. D'una banda, els sistemes basats en regles no deixen de ser, essencialment, sistemes que tradueixen paraula a paraula i, per tant, fan molts calcs. D'altra banda, els sistemes de traducció automàtica estadística anaven millorant, des d'un rudimentari paraula per paraula a unitats de traducció més grans, però amb resultats molt desiguals. Ara, però, s'imposa la traducció automàtica neuronal, amb una qualitat molt més alta. Els llecs en la matèria no arribem a entendre com funciona, però ens diuen que es tracta d'una aplicació d'intel·ligència artificial, és a dir, l'algoritme aprèn i millora.

El traductor de Google —que encara deu ser el més popular amb diferència— incorpora la tecnologia neuronal i permet traduir entre un ventall de llengües que va força més enllà de les principals dominants, del guaraní l'uigur, de l'ídix al gaèlic escocès, del frisó al maori. I sí, també l'esperanto. Això pel que fa a textos escrits breus. Una altra cosa, de moment, són els traductors amb reconeixement de veu, però no sembla gens forassenyat predir que ben aviat estarà a l'abast general parlar amb un mòbil en una llengua i que la màquina ho escupi en

”

Quantes llengües, de les cap a cinc mil que encara es parlen al món, es poden permetre accedir massivament a tecnologia necessària per crear aquests corpus orals?

una altra, de manera que una persona catalanoparlant i una de vietnami-ta podran tenir una conversa més o menys confortable cadascú en la seva llengua.

Un panorama idealitzat ens ofereix la imatge d'una humanitat proveïda d'un simple aparell portàtil com és el mòbil, gràcies al qual s'ha acabat la necessitat d'una llengua franca internacional com l'anglès (o l'esperanto), o ni tan sols estatal. Tothom es pot instal·lar còmodament en el seu monolingüisme i comunicar-se amb tot el món amb aquesta tecnologia, que tant valdrà per parlar com per llegir com per seguir una conferència o un curs. Així ningú no haurà de renunciar a la seva llengua, tingui la mida que tingui i sigui on sigui.

### ALGUNES COSES NO TAN BONES

Ara bé, els sistemes de traducció automàtica es basen en l'anàlisi i la comparació d'exemples de llengua, en grans corpus lingüístics. Com més gran és el corpus en què es poden basar, més afinen. Per tant, cal disposar d'enormes bases de dades de cada llengua. D'aquí que, de cara al reconeixement de veu en català (essencial per a la traducció automàtica oral) la Generalitat hagi fet campanya per reclutar múltiples gravacions a través de l'anomenat projecte AINA. “Es busquen milions de veus per ensenyar la tecnologia a parlar en català”, diu l'eslògan. Però quantes llengües, de les cap a cinc mil que encara es parlen al món, es poden permetre accedir massivament a tecnologia necessària per crear aquests corpus orals? I escrits, si una part important d'aquestes llengües compta amb molt poca o gens de tradició escrita? No n'hi ha prou amb generalitzar el mòbil amb micròfon i programari: cal la infraestructura per emmagatzemar i processar els corpus. I això de moment ni ho té ni ho controla qualsevol. Com se sol dir, no tenim els arxius al núvol, els tenim a l'ordinador d'un altre, sovint molt lluny. I com

”

No creiem que la traducció automàtica hagi vingut a salvar la diversitat lingüística. No en si mateixa. Per això ja hi ha idees molt més antigues, com la d'una llengua artificial auxiliar comuna

persona komputilo devus ebligi demokratiigon de la aliro al informoj kaj amuziĝoj, en la senco ke eblos tion fari en la propra lingvo, sendepende de tio, ĉu ĝi havas multajn aŭ malmultajn parolantojn aŭ disponas pri pli aŭ mapli da politika povo? Ĉu tio ne devus ebligi ke iu ajn programo estus uzebla en iu ajn lingvo? Eĉ, ĉu ne ĉiu ne povus aldoni kiun ajn ciferigitan tekston – kuirrecepton aŭ romanon - kaj tradukigi ĝin en sian lingvon?

## KELKAJ BONAJ AFEROJ

Ĝis antaŭ nelonge, unu el la evidencitaj problemoj de la maŝintradukado estis ĝia malbona kvalito. Unuflanke, la sistemoj bazitaj sur reguloj estas, esence, sistemoj tradukantaj vorton post vorto, sekve ili multe paŭsas la originalon. Aliflanke, la statistikaj traduksistemoj iom post iom pliboniĝis ekde rudimenta vorto-post-vorto al pli grandaj traduk-unuoj, sed kun malegalaj rezultoj. Nun, tamen, regas la neŭra maŝintradukado, kun ege pli alta kvalito. Ni, nefakuloj, ne plene sukcesas kompreni kiel ĝi funkcias, sed onidire temas pri programo de artefarita intelekto, tio estas la algoritmo lernas kaj pliboniĝas.

La tradukprogramo de Google - kiu verŝajne daŭre restas la larĝe plej populara - integrigas la neŭroteknikon kaj ebligas la tradukadon de ampleksa lingvopaletro kiu iras preter la ĉefaj gravaj lingvoj, de la gvarania al la uĝgura, de la jida al la skotgaela, de la frisa al la maoria. Kaj, certe, ankaŭ esperanto. Tio rilate al mallongaj skribaj tekstoj. Alia afero, ĝis nun, estas la tradukiloj per voĉrekonado, sed ne ŝajnas freneze antaŭdiri ke baldaŭ eblos paroli per poŝtelefono en iu lingvo kaj ke la maŝino transdonu tion en alian, tiel ke katalunparolanto kaj vietnamparolanto povos havi pli-malpli komfortan interparolon ĉiu en sia lingvo.

Idealigita panoramo montras al ni la bildon de homaro disponanta de simpla portebila ilo kiel poŝtelefono,

”

Kiom da lingvoj, de la ĉirkaŭ kvin mil ankoraŭ parolataj en la mondo, povas permesi al si aliri amase la teknologion bezonatan por krei tiujn voĉajn datumbazojn?

”

Niaopinie maŝintradukado ne alvenis por savi la lingvan diversecon. Ne en si mem. Tial jam ekzistas ideoj multe pli malnovaj, kiel tiu de komuna internacia artefarita helplingvo

danke al kiu finiĝis la bezono de internacia pontolingvo kiel la angla (aŭ esperanto), aŭ eĉ ne ŝtata. Ĉiu povus resti komforte en sia unulingveco kaj komuniki kun la tuta mondo per tiu teknologio, kiu taŭgos same por paroli aŭ por legi aŭ sekvi prelegon aŭ kurson. Tiel neniu devos rezigni al sia lingvo, negrave kiom granda ĝi estas kaj kie oni situas.

## KELKAJ AFEROJ NE TIOM BONAJ

Tamen, la sistemoj de maŝintradukado baziĝas sur la analizo kaj komparo de lingvaj ekzemploj, en grandaj lingvaj tekstaroj. Ju pli grandas la baza tekstaro, des pli ili trafas. Tial bezonatas enormaj datumbazoj en ĉiu lingvo. Pro tio, por la voĉrekonado en la kataluna (esenca por parola maŝintradukado) la Kataluna aŭtonoma administracio kampanjis celante rekruti multnombrajn voĉregistrojn pere de la tiel nomata projekto AINA. “Oni serĉas milionojn da voĉoj por instrui al la teknologio paroli katalune”, diras la slogano. Sed kiom da lingvoj, de la ĉirkaŭ kvin mil ankoraŭ parolataj en la mondo, povas permesi al si aliri amase la teknologion bezonatan por krei tiujn voĉajn datumbazojn? Kaj ankaŭ skribajn, ĉar grava parto de tiuj lingvoj posedas etan aŭ nulan skriban tradicion? Ne sufiĉas disvastigi saĝtelefonon kun mikrofono kaj fakprogramaro: nepras la infrastrukturo por stoki kaj procezi la tekstarojn. Kaj ĝis nun tio ne disponeblas kaj ne kontroleblas de iu ajn. Kiel oni diras, ni ne havas niajn dosierojn en la nubo, ni havas ilin en alies komputilo, ofte en la fora malproksimo. Kiel povas, do, lingva komunumo kun kelkaj miloj da parolantoj (la plejmulto) kunmeti milionojn da voĉoj aŭ tekstoj por ebligi ke la sistemo de maŝintradukado disponu pri sufiĉaj bonkvalitaj datumoj por garantii bonan tradukon? Laŭ vortoj de la spertulo András Kornai en 2013 (kaj tio esence ne ŝanĝiĝis en dek jaroj, kaj verŝajne ne ŝanĝiĝos en jardekoj):

pot una comunitat lingüística d'uns pocs milers de parlants (la majoria) aportar milions de veus o de textos per tal que el sistema automàtic tingui prou dades de qualitat per aconseguir una bona traducció? En paraules de l'expert András Kornai l'any 2013 (i això no ha canviat essencialment en 10 anys, ni pot canviar en dècades):

Per a qualsevol parella de llengües, Google Translate vol tenir corpus de mil milions de paraules [*gigaword corpora*] de les llengües d'origen i de destinació i un milió de paraules de text paral·lel. Per a les llengües amb vitalitat, aquesta no és una barrera difícil de creuar. En general, podem reunir un corpus així només rastrejant la web, i els textos traduïts de manera estàndard formen una base sòlida per crear un corpus paral·lel. Però per a les llengües amenaçades això és un problema real, perquè el material en línia està tan poc estès per la xarxa que necessitem tècniques dissenyades específicament per trobar-lo, i fins i tot aquestes tècniques només suposen una gota del vas [...]. Per empitjorar les coses, els resultats d'aquest rastreig no estan disponibles per al públic per por a infringir drets d'autor, però en l'era digital el que no es pot descarregar no existeix.

De nou, el món té forma d'embut. Unes quantes llengües, potser dues o tres-centes, arribaran a comptar amb sistemes de traducció automàtica decentes, orals i escrits. De moment, el Google traductor ofereix traducció entre 133 llengües. Deunidó! I algunes d'aquestes llengües estan amenaçades, com el gaèlic escocès o el frisó. Però la gran majoria són llengües europees i asiàtiques amb milions de parlants. Àfrica hi és molt poc representada, igual que les llengües precoloniales d'Amèrica o del Pacífic. La majoria d'aquestes llengües difícilment

podran comptar a curt termini amb corpus d'aquestes mides ingents. En què sentit, l'única opció que tenen ara com ara és la traducció basada en regles, com el sistema Apertium, que ja incorpora llengües com l'arpià o l'aragonès.

Però fins i tot en aquests pocs centenars de llengües en què segurament podrem disposar de traducció automàtica de qualitat alta i preu relativament baix, hi ha problemes. Hi ha experts, com Pilar Sánchez-Gijón i Ramon Piqué (2020), que creuen que els biaixos són difícils d'evitar, ja que l'algorisme traductor s'alimenta d'una determinada base d'entrenament validada per humans. "Les dades utilitzades pels actuals sistemes de traducció automàtica tenen un biaix degut a la naturalesa dels projectes pels quals van ser creades i la llengua de partida principal utilitzada (anglès)", diuen aquests autors. I aquest biaix afecta tant el "punt de vista" de la màquina traductora com la pròpia naturalesa de la llengua a què es tradueix. És a dir, el resultat de la traducció automàtica no només influeix en el què es diu, sinó també en el com es diu. Si es generalitza, pot arribar a afectar això l'estructura gramatical de les llengües?

Tanmateix, potser el principal escull per a la diversitat lingüística en relació amb la traducció automàtica i les seves possibilitats sigui la voluntat política. Les grans corporacions que inverteixen en el desenvolupament d'aquestes eines tenen com a objectiu promoure la diversitat? O tot el contrari? I les empreses multinacionals que produeixen bens lingüístics? I els estats, que perceben la diversitat de la pròpia població com una amenaça? El problema de la preservació de la diversitat lingüística no ha sigut mai la tecnologia. Més aviat al revés: s'ha fet

servir gairebé sempre per eliminar-la, per homogeneïtzar la població, primer a escala local i ara ja en bona part, global. Qui mana vol seguir tenint la paella pel mànec, i la diversitat, de tota mena, no hi sol contribuir.

De moment hem preguntat al famós Xat GPT si creia que la traducció automàtica pot contribuir a preservar la diversitat lingüística. La resposta: "No necessàriament. Encara que la traducció automàtica pot ser una eina útil per a que els parlants d'una llengua minoritària es comuniquin amb un públic més ampli, el seu ús massiu també pot homogeneïtzar les llengües i erosionar la diversitat lingüística. És important suportar i fomentar l'ús i desenvolupament de les llengües minoritàries de manera independent".

Així doncs, no creiem que la traducció automàtica hagi vingut a salvar la diversitat lingüística. No en si mateixa. Per això ja hi ha idees molt més antigues, com la d'una llengua artificial auxiliar comuna i desvinculada de qualsevol comunitat lingüística concreta, per fer servir per a la comunicació interlingüística i així impedir que una de natural s'alci sobre les altres i les substitueixi. Si no ha funcionat prou, no és pas perquè sigui una mala idea. Oi esperantistes? ■

---

Andras Kornai (2013). "Digital Language Death". *Plos One*, <https://doi.org/10.1371/journal.pone.0077056>

Pilar Sánchez-Gijón Ramon Piqué (2020). "Conseqüències de la traducció automàtica neuronal sobre les llengües d'arribada". *Revista Tradumàtica: Tecnologies de la Comunicació*, 18, p. 1-10, <https://doi.org/10.5565/rev/tradumatica.277>





Por kiu ajn lingvoparo, Google Translate postulas tekstaron de miliardo da vortoj [gigaword corpora] de la fontoj kaj cellingvoj plus milionon da vortoj en paralela tekstaro. Por vivoplenaj lingvoj tio ne estas malfacile transpasebla barilo. Ĝenerale, oni povas krei tian tekstaron per simpla reta traserĉo, kaj la tradukitaj tekstoj kutime permesas krei solidan bazon por estigi paralelan tekstaron. Sed por minacitaj lingvoj tio starigas realan problemon, ĉar enretigita materialo maloftas kaj estas bezonataj specifaj iloj por ĝin identigi, kaj eĉ tiuj teknikoj nur estas guto el la tuto[...]. Eĉ la afero pli malbonas ĉar la rezultoj de tiu traserĉo ne disponeblas por la publiko pro la timo lezi aŭtorajn rajtojn, sed en la cifereca erao kio ne elŝuteblas, tio ne ekzistas.

Denove la mondo funelformas. Kelkaj lingvoj, eble du aŭ tri centoj, sukcesos akiri decajn traduksistemojn, skribajn kaj parolajn. Nuntempe, Google-tradukilo ofertas tradukadon en 133 lingvojn. Ne malmulte. Kaj kelkaj el tiuj lingvoj estas minacataj kiel la skotgaela aŭ la frisa. Sed la plimulto estas eŭropaj kaj aziaj lingvoj kun milionoj de geparolantoj. Afriko estas malforte reprezentita, same kiel la antaŭkoloniaj lingvoj en Ameriko aŭ Pacifiko. La plimulto el tiuj lingvoj malfacile povos baldaŭ havigi tiajn enormajn korpusojn. Ĉi-rilate la sola solvo, kiun ili havas nuntempe, estas la traduko bazita sur reguloj, kiel la sistemo Apertium, jam proponanta lingvojn kiel la arpitanan aŭ la aragonan.

Sed eĉ en tiu kelkcento da lingvoj en kiuj kredeble oni povos disponi pri altkvalita maŝintradukado kaj relative malalta prezo, ekzistas problemoj. Certaj fakuloj, kiel Pilar Sánchez-Gijón kaj Ramon Piqué (2020), opinias ke la devioj malfacile eviteblas, ĉar

la tradukalgoritmo nutras sin de difinita trejna bazo validigita de homoj. “La datumoj uzataj de la nunaj sistemoj de maŝintradukado havas devion pro la naturo de la projektoj per kiuj ili estis kreitaj kaj de la ĉefa fontolingvo (la angla)”, asertas tiuj aŭtoroj. Kaj tiu devio influas ne nur la “vidpunkton” de la tradukmaŝino sed eĉ la karakteron de la cellingvo. Tio estas, la rezulto de la maŝintradukado influas ne nur tion, kion oni diras, sed kiel oni diras tion. Se ĝi disvastiĝas, ĉu tio povas influ en la gramatikan strukturon de la lingvoj?

Tamen, eble la ĉefa malhelpo por la lingva diverseco rilate al la maŝintradukado kaj ĝiaj eblecoj estas la politika volo. Ĉu la entreprenoj kiuj investas en la evoluigon de tiuj iloj celas promocii diversecon? Aŭ ĉu tute male? Kaj kio pri la multnaciaj entreprenoj produktantaj lingvajn varojn? Kaj la ŝtatoj, kiuj perceptas la diversecon de sia loĝantaro kvazaŭ minacon? La problemo de la konservado de lingva diverseco neniam estis la teknologio. Fakte okazis male: oni uzis ĝin preskaŭ ĉiam kun la celo nuligi la diversecon, por homogenigi la loĝantaron, unue loke, kaj nuntempe, plej ofte, jam tutmonde. Kiu regas volas daŭre regi, kaj diverseco, ĉiuspeca, plejofte ne kontribuas al tio.

Provizore ni demandis la faman ChatGPT ĉu ĝi opinias ke la maŝintradukado povas kontribui al la konservado de lingva diverseco. Jen la respondo: “Ne nepre. Eĉ se aŭtomata tradukado povas ebligi ke parolantoj de minoritata lingvo komuniku kun pli vasta publiko, ĝia amasa uzado povas homogenigi la lingvojn kaj erodi lingvan diversecon. Gravus sendepende subteni kaj instigi la uzadon kaj evoluigon de la minoritataj lingvoj”.

Tiel do, nia opinie maŝintradukado ne alvenis por savi la lingvan diversecon. Ne en si mem. Tial jam ekzistas ideoj multe pli malnovaj, kiel tiu de komuna internacia artefarita helpolingvo neligita al iuj konkretaj lingvokomunumo, kiu utilu al interlingva komunikado kaj tiel malebligu ke iu natura lingvo elstariĝu super la aliajn kaj ilin anstataŭu. Se ĝi ne sufiĉe sukcesis, la kialo ne estas ke ĝi estas malbona ideo. Ĉu ne, esperantistoj? ■

---

András Kornai (2013). “Digital Language Death”. *Plos One*, <https://doi.org/10.1371/journal.pone.0077056>

Pilar Sánchez-Gijón Ramon Piqué (2020). “Conseqüencies de la traducció automàtica neuronal sobre les llengües d’arribada”. *Revista Tradumàtica: Tecnologies de la Comunicació*, 18, p. 1-10, <https://doi.org/10.5565/rev/tradumatica.277>



# ĈU AŬTOMATA TRADUKADO IAM IGOS ESPERANTON SENCELA?

**Hektor Alos i Font**

Socilingvisto, disvolvanto de aŭtomataj tradukiloj por minoritataj lingvoj



GERD ALTMANN

**E**n la lastaj unu-du jardekoj okazis tre ĝojinda pliboniĝo de la maŝintradukado dank'al la uzo de novaj metodoj. Ankaŭ la voĉteknologioj rimarkinde progresis, permesante kaj pli bonan rekonon de tio dirita, kaj pli naturan produktadon de la parola lingvo. La kunigo de tiuj novaĵoj permesas, ke nuntempe per poŝtelefono jam eblas diri ion en iu lingvo kaj ricevi voĉan tradukon en alia. Tio ebligas bazan interkompreniĝon en gastejoj, restoracioj aŭ bazaroj. Konsiderante la ŝajne eksponencialan perfektigiĝon de la teknologio, la demando staras, ĉu en antaŭvidebla estonteco la lernado de fremdaj lingvoj fariĝos nenecesa, kaj specife tiu de internacia lingvo (neŭtrala aŭ ne).


Nia opinio estas, ke tio eventuale okazos, sed nur se en la mondo restos ne pli ol kelkaj dekoj aŭ, maksimume, kelketaj centoj da vivantaj lingvoj. Sed eĉ por la supervivontaj lingvoj ne klaras, ke la socioj akceptos la uzon de tiaj sistemoj en la ĉiutaga vivo.

Por kompreni, kiel la lingvoteknologioj povas evolui, indas unue kompreni, kiel ili nun funkcias. Sur tiu bazo

eblas racie ekstrapoli la estontan evoluon, almenaŭ mez-perspektive.

Nuntempe, la voĉa tradukado esence funkcias surbaze de tri aŭtonomaj sistemoj. Por traduki de la lingvo A en la lingvon B, unue la voĉa elparolo en A estas transskribita en tekston en tiu ĉi lingvo. Tuj poste, tiu teksto estas tradukita de A en B. Laste, la teksto en B estas voĉigita (diagramo 1).

**Diagramo 1: La etapo de voĉtraduko.**



Ni koncentriĝu en la kerna etapo de tiu procezo: la traduko de tekstoj de unu lingvo en alian. La tipaj metodoj uzataj en la komenco de la dumilaj jaroj estis bazitaj sur reguloj. Esence, oni disponas pri vortaroj, permesantaj laŭvortan tradukon, kaj kolekto de reguloj (kutime mane verkitaj), flikantaj la bazan tradukon per forigo aŭ aldono de vortoj kaj ilia reordigo tie, kie necesas. Tiel funkcias, ekzemple, la aŭtomata tradukil-motoro Apertium, per kiu en 2007 oni kreis tradukilon de la kataluna en esperanton. La problemoj de tiu metodo estas pluraj: ili postulas multe da mana laboro por krei la regulojn; ili malbone funkcias por tradukiloj inter lingvistike foraj lingvoj (ekz. la hispana kaj la eŭska), ĉar la baza laŭvorta traduko estas ege malsama de la celo; kaj, laste, la tradukoj ne malofte sentiĝas kiel nenaturaj pro la esenco mem de la sistemo, kiu paŭsas la fontan lingvon.

Por solvi tiujn problemojn aperis novaj paradigmoj: unue la statistikaj kaj nuntempe la t.n. neŭraj tradukiloj. La plej famaj kaj vaste plej uzataj el tiuj sistemoj estas la Guglo-tradukiloj. Kvankam la du metodoj interne funkcias tre malsame, en multaj aspektoj ili similas: per kunmetado de vasta amaso de dulingvaj tekstoj oni “trejnigas” la motoron, kiu “lernas” kiel traduki de unu lingvo en la alian. Aparte substrekindas, ke malkiel la tradukiloj bazitaj je reguloj, la novaj sistemoj ne bezonas grandan kvanton da homa laboro (krom eventuale por la ciferigo de paperaj libroj kaj gazetoj). Anstataŭe ili postulas kolosan kvanton da donitaĵoj kaj da procez-tempo kaj -kapablo, kio ne kaŭzas grandajn zorgojn al programaraj gigantoj.

Surbaze de tiuj scioj, eblas rapide kompreni, ke la larĝa plimulto de la lingvoj ne povas esperi je neŭra maŝintradukado. Kie finiĝas lingvo, kaj kie komenciĝas alia, estas tre ofte diskutebla afero. Ĉiel ajn, la fama katalogo *Ethnologue* taksas, ke nuntempe ekzistas pli ol 7000 vivantaj lingvoj en la mondo. Ĝi nombras ankaŭ pli ol 4000 havantajn ian

skribsistemon, kvankam aldonas, ke la vasteco de ilia uzado ne ĉiam estas konata.<sup>1</sup> Tio principe ekskludas de la maŝintradukado la parolantojn de praktike la duono de la lingvoj de la mondo, krom se oni disvolvas skribajn formojn por ili (kio nek simplas, nek ĉiam estas dezirata).

Pli grave, neŭraj tradukiloj bezonas, kiel dirite, grandan kvanton da dulingvaj tekstoj. Ekzemple, por la ĉuvaŝa-rusa tradukilo (jam uzebila ĉe Yandex, la rusia ŝajn-Guglo) preskaŭ pretas la ciferigo de pli ol 200 romanoj. Kiom da lingvoj en la mondo posedas tiagradan skribitan literaturon? Tre verŝajne ne pli ol kelkaj centoj. Krome, temas pri tekstoj troveblaj ankaŭ en la cellingvo: netradukitaj tekstoj estas principe neutilaj. Ekzistas prototipoj de sistemoj por lingvoj kun malpli da tekstoj, ekspluatantaj lingvosimilecon: ekzemple, se neŭran tradukilon por la aragona ne eblas konstrui pro manko de dulingvaj tekstoj (aŭ entute de sufiĉaj tekstoj), oni provas trejni neŭran reton por la aragona, kiu antaŭe estis trejnita per proksimaj lingvoj, kiel ekz. la hispana aŭ/kaj la kataluna. La celo estas, ke la aŭtomato iel ekstrapolu la specifajojn de la aragona, surbaze de tio, ke esence ĝi ne tre malsamas al la apudaj latinidaj lingvoj. Kiom da teksto estos necesa por tio, kaj kiom “pura” estos la rezulta aragona (ne hispanigita aŭ katalunigita), tio estas zorgiga afero. Ankaŭ la malo eblas: surbaze de la kompreno de iuj karakterizaj trajtoj de la aragona, la sistemo tre povas elpensi eblajn, sed neekzistantajn, vortojn aŭ konstruojn, kvazaŭ ĝi estus partiano de lingvopurismo. Oni rimarku, ke tre similan problemon oni alfrontas, kiam aperas vortoj en la fontoteksto, kies ekvivalenton oni ne konas: ekzemple, se oni tradukas biokemian studon en la ŝilukan lingvon el Sud-Sudano, estas tre verŝajne, ke la tradukilo devos elpensi grandan parton de la terminologio. Tio montras, ke se oni pretendas iam konstrui

universalan tradukilon, necesas transiri la kutiman ideon, kiun oni havas pri tradukado, por vole-nevole fariĝi terminologiistoj. Tiu kapablo, cetere, inkluzivas ankaŭ la lastajn furorvortojn ĵus lanĉitajn de la usonaj aŭ bengalaj gazetoj, ŝlagroj aŭ sociaj retoj, kiam ni tradukas el ili ŝiluken aŭ katalunen. Do, necesas ankaŭ konstante atenti la nove kreigantaj vortojn en la koncernaj lingvoj, ĉar novaj vortoj aperas ĉiutage en iom grandaj lingvokomunumoj.

Sed verŝajne la plej kerna problemo de maŝintradukado estas, ke ĝi iamaniere sidas en la pinto de pensoparadigmo, konsistanta en la ideo, ke la lingvoj estas esence unuecaj kaj ke eblas ĉiam krei lingvovariantojn normajn, uzindajn de la tuta lingvokomunumo. Tiel ni alkiutimiĝis pensi, ke ekzistas la franca, la angla, la hispana, la rusa, la ĉina ktp. Nu, ni ja scias, ke ekzistas dialektoj, kaj kelkaj el niaj komputilaj programoj permesas distingi, kiun *ŝtatan* varianton de mondolingvo elekti, kvazaŭ ekzistus unu brita angla, unu usona angla, unu paragvaja hispana, unu bolivia hispana ktp. kaj ke dialektaj limoj estus tajlitaj laŭ administraciaj limoj (plej ofte ŝtataj). Ni tuj rimarku, cetere, ke en maŝintradukado tiaj variantoj preskaŭ neniam elekteblas. Permesi tion signifus plene repensi la tekstarojn, per kiuj estas trejnitaj la tradukiloj, kaj tre malfaciligus ilian kunigon pro la multobligo de la variantoj. Ĉiel ajn, tio donus nur palan surogaton de la efektiva diverseco de tiuj lingvegoj.

La problemo estas, ke nuntempe la varieco en la lingvoj kun malforta kaj/aŭ antaŭnelonga normigo estas signife pli granda ol en la lingvoj kun armeo kaj lerneja sistemo. Ni prenu la ekzemplon de la gaskona, unu el la ses ĉefaj dialektoj de la okcitana. La vortaro *Per Noste* proponas kvar formojn por ‘februaro’: ‘heurèr’, ‘hrevèr’, ‘he-revèr’, ‘hiurèr’. *Atau que’s ditz* aldonas ‘hervèr’. En kiu “lingvego” eblas trovi kvin formojn en nur unu dialekto por nomo de monato? Tiel granda varieco troveblas ankaŭ en la morfologio (ar-

<sup>1</sup> <https://www.ethnologue.com/enterprise-faq/how-many-languages-world-are-unwritten-0>



tikoloj, posedaj determinantoj, genraj formoj, pluraloj, verbaj finaĵoj ktp.), same kiel en la sintakso, en la uzo aŭ ne uzo de iuj tensoj (plene aŭ en difinitaj kunteksto) ktp.

La forta interna diverseco de la okcitana estas fakte la normo en la lingvoj de la mondo. Male, la multe pli granda unutoneco de la “mondolingvoj” devenas de ilia longa tradicio de skribado kaj presado, de la rabotado de fiksitaj normomodeloj fare de institucioj, de ilia amasa disvastigo en la socion pere de lernejoj kaj de amaskomunikiloj kaj de ilia entronigo per tuta sistemo malhelpanta la socian supreniron de la neregantoj de tiuj normolingvoj. Tial ne troveblas 8–10 formoj por ‘februaro’ en tiaj lingvoj. Sed ĉiuj ĉi institucioj kaj premoj ne ekzistas por 95% de la lingvoj de la mondo, aŭ ili estas multoble malpli potencaj. Do, por trejni neŭran reton, por ke ĝi “komprenu” la okcitanan, montriĝas, ke ni bezonas multe pli da tekstoj ol por ekz. la hispana, la angla aŭ la rusa, tamen je nia dispono estas klare malsufiĉaj tekstoj eĉ por nutri iom kvalitan neŭran tradukilon, se la lingvo estus tiel normigita kiel ili.

Tamen eĉ pli malfacile povas fariĝi, kian lingvon produkti. “Norma okcitana” ne ekzistas, eĉ ne “norma gaskona”, “norma langvedoka”, “norma provenca” ktp. Esence troveblas ortografiaj reguloj, priskribaj gramatikoj... kaj ne granda deziro ĉe la parolantoj elkovi unuecan formon, takseblan kiel modelan, eĉ ne je la nivelo de dialekto (krom eble por kelkaj sub(sub)dialektoj, kiel la arana). Do, *kiun* okcitanan produkti estas defio. Tio neniel estas unikaĵo, sed, male, tute normala afero. Ekzemple, por produkti *nynorsk* (unu el la du oficialaj normaj formoj de la norvega lingvo), la nuna versio de la tradukilo Apertium permesas al la uzanto agor-

di 85 malsamajn parametrojn. Tia grado de fajneco eblas per mana laboro, sed certe ne per la industriaj metodoj uzataj de la programaraj gigantoj.

Aldonindas, ke la rekta traduko de iu ajn lingvo en iun ajn alian estas neebla. Tion kaŭzas ne nur, ke preskaŭ neniam eblas trovi du-lingvajn tekstarojn inter du hazardde elektitaj lingvoj (ekz. la ŝiluka kaj la kataluna), sed ankaŭ ke ekzistas milionoj da kombinoj de du lingvoj. Necesas uzi pontolingvojn, t.e. unu aŭ pluraj sinsekvaj tradukoj. Ekzemple por teramanigi huastekan tekston oni plej verŝajne devus traduki de la huasteka en la hispanan, de la hispana en la anglan, de la angla en la indonezian kaj de la indonezia en la teramanan. Evidente io perdiĝus en ĉiu ŝtupo. Ankaŭ tio montras la negalecon de lingvoj kaj de lingvanoj malgraŭ eventuale superpotencaj teknologioj: parolantoj de la pli centraj lingvoj en tiu implicita hierarkio ĉiam ricevos pli kvalitajn tradukojn ol la parolantoj de la “periferiaj” lingvoj. Cetere, la ekzemplo ne nepre esta deliro: se vi iam tradukis el la kataluna al la ĉuvaŝa per Yandex, vi jam spertis tre similan lingvoĵongladon... kaj malfeliĉigajn rezultojn.

Por ne longigi, ni flankenlasas la problemojn de la kompreno de la parolo kaj ĝia generado. Ni diru nur, ke ankaŭ ili estas egaj. Pensu pri tio, ke por povi aŭtomate transskribi lingvon necesas trejni la sistemon per enormaj kvantoj da sonregistraĵoj. Kaj tiuj ĉi ne nur devas kovri la dialektan variecon de la parola lingvo (kiu estas multege pli larĝa ol tiu de la skriba), sed ankaŭ enteni specimenojn de parolo el malsimilaj genroj, aĝoj (ankaŭ de infanoj), rapideco de parolo, parol-difektoj ktp. ktp. Ni menciuj ankaŭ la grandajn traduk-problemojn ĉe malsamaj konceptoj en la mondo

rilate ĝentilecon, humuron (ekz. ironion) k.a., kiuj aparte komunas en la neformala parola lingvo. Tio montras, ke, se oni provas rekte konstrui voĉan tradukilon inter du lingvoj (ekz. inter du lingvoj sen skribo), kvankam tio teorie eblas, la problemo estas multoble pli kompleksa ol por skriba tradukilo: la vojo tra la skribado estas tre oportuna formo dispecigi kolosan taskon en plurajn malpli kompleksajn ŝtupojn.

Ĝis nun estis praktikaj la teknikaj problemoj ligitaj al aŭtomata tradukado. Esence, tre eblas imagi, ke la denaskaj parolantoj de lingvoj kun dekoj da milionoj da parolantoj el landoj kun alta viv-nivelo havos iam la teknikan eblon interkomuniki uzante traduk-teknologiojn, ĉefe en formalaj aŭ duon-formalaj kunteksto.

Tamen, kiom da homoj akceptos, ke la gastlaboristoj ne lernis “la lingvon de la lando”? Ĉu la supremaciistoj akceptos, ke la lingvaj minoritatoj senĝene parolas en sia lingvo en ĉiuj vivosferoj, kvazaŭ egaluloj? Potenculoj ĉiam uzadis lingvaj trajtojn por distingi sin, dum ekspluatitoj ofte utiligis ilin por rekoni siajn samsortanojn. La funkcioj de lingvo larĝe superas tiujn de simpla komunikilo. Ili estas ankaŭ instrumentoj foje por afiŝi sin kaj ĉiam por rekoni kaj/aŭ taksi aliajn.

Necesas radikalaj ŝanĝoj en la sintenoj de la tuta homa specio, por ke ni estu indiferentaj koncerne la lingvon uzatan de nia interparolanto. Estas tre malfacile imagi, ke tio eblas, tamen, se entute estus tiel, la transformo bezonus multajn generaciojn. Dume, por eviti diskriminacion, lernado de fremdaj lingvoj daŭre estos necesa por multaj, same kiel konstanta zorgo pri neegalrajteco de homoj. ■



**Premis literaris Grau Miró**  
**Amb una secció especial per a la divulgació de l'esperanto**

[premiliterarisgraumiro.wordpress.com](http://premiliterarisgraumiro.wordpress.com)

# «Tradukiloj ne rimarkas sarkasmon aŭ tonon»

## INTERVJUO AL SIRU LAINE

**Sandra Vives**

Peranto kaj estrarano de KEA

Siru Laine naskiĝis en Turku, Finnlando, kaj loĝas en Barcelono de antaŭ naŭ jaroj. De kiam ŝi estis infano, ŝi montris grandan intereson pri la lingvoj, kaj kvankam ŝi ne intencis, ŝi iĝis profesia tradukisto. Ŝi rakontis kelkajn interesaĵojn pri tio, kiel vere funkcias ŝia laboro nuntempe kun la helpo de tradukteknologio.

**Kiel via kariero kiel tradukisto? Ĉu vi memoras tempojn kiam la tradukprocezo bezonis multe da peno kaj oni uzis paperon kaj vortaron?**

*Kiam mi estis infano mi ne ŝatis traduki. Poste mi volis studi lingvistikon sed mi sciis ke per tio estus malfacile trovi laboron. Tiutempe mi ĵus finis miajn universitatajn studojn pri la islanda lingvo en Rejkjaviko, kaj fine mi decidis fari la magistran diplomon pri tradukado. Dum miaj studoj mi tradukis el la islanda al la finna kaj tiam mi ne sciis pri Google Translate, eĉ ne estis rektaj vortaroj. Mi devis uzi la anglan vortaron kiel ponton kaj fari ĉion mane, kaj tio estis antaŭ ne tiom multe, en 2011.*



**Ĉu vi iam vidis tradukteknologion aŭ iun specifan teknologian antaŭeniĝon kiel minacon por via laboro?**

*Mi ne, ĉar mi laboras ĉefe kun lingvoj kun kiuj tiaj tradukiloj ne bone funkcias, sed se mi ekzemple laborus nur kun la hispana aŭ kataluna kaj la angla, tiam povus esti minaco. Aliflanke, estas aferoj kiujn maŝinoj ne povas trovi, kiel nuancoj, ĝenroj en la frazo aŭ lingvotavoloj. Ekzemple, tradukiloj ne rimarkas sarkasmon aŭ tonon, kaj anstataŭ ilia rekta neĝusta traduko, homo tradukus tion alimaniere.*

**Via gepatra lingvo estas la finna, ĉu vi tradukas ankaŭ al aliaj lingvoj? Kiuj estas viaj lingvokombinoj?**

*Plejparte de la angla al la finna, kelkfoje de la finna al la angla aŭ al la islanda, kelkfoje mi eĉ tradukis al esperanto medicinajn dokumentojn aŭ inter pli strangaj lingvoj, kiel feroa-angla, sveda-itala, sed tiam mi rimarkigas al la kliento ke mi ne estas denaskulo kaj ke iu devus kontroli post mi.*

**Kiom granda entute estas la kvalito de tiuj tradukiloj rilate al la finna (ĉar mi kredas ke estas tre grandaj diferencoj depende de la lingvokombinoj).**

*Mankas kvalito pri specifaj vortoj en la finna kaj la islanda kaj ankaŭ pro tio ke la finna gramatiko estas tute alia, ĝi ne funkcias kiel la hindeŭropaj lingvoj kaj tio ofte kaŭzas problemojn, la tradukiloj ne konas ĉiujn gramatikajn kazojn. Sed Google Translator pliboniĝis multe; mi rimarkis tion ankaŭ en la eŭska, antaŭ kelkaj jaroj ĝi ne funkciis tiom bone kiel nuntempe.*

**El ajna lingvo al la angla Google Translator ĝenerale plej bone funkcias, ĉu ne?**

*Dependas de la lingvo, sed dependas ankaŭ de tio kion oni skribas: se oni*

*skribas nur unu vorton, la traduko povas esti neĝusta, sed se oni skribas frazon, ĝi povas esti ĝusta. Dependas multe de tio. Sed ajnakaze la angla estas la plej bone redonata.*

**Nuntempe vi estas specialiĝinta tradukisto pri sciencaj tekstoj, specife pri medicino. Kiel maŝintradukiloj estas uzataj en profesia medio kiel la via?**

*Kutime la kompanioj por kiuj mi laboras havas siajn proprajn tradukilojn kaj ili produktas pli-malpli ĝustajn tekstojn. Ĉiam alvenas al mi similaj dokumentoj, kiel klinikaj provoj kaj konsentiloj. Mia rolo estas kontroli la jam sufiĉe bone faritan tradukon (ĉu estas la ĝusta lingvotavolo, la inaj pronomoj, ekzemple) kaj traduki partojn kiujn la maŝino klopodis fari, sed ne sukcese. Tiel la procezo estas multe pli rapida ol starti de nulo.*

**Ĉu ili pagas al vi kvazaŭ estus traduko de nulo?**

*Ne. Kutime la tradukistoj pensas, ke ili tradukas po 300 vortoj hore, sed kun maŝintradukado mi kutime kalkulas ke estas po 500 vortoj hore kaj la prezo adaptiĝas laŭhore. Sed se estas iu dokumento kiun oni jam tradukis plurfoje kaj ŝanĝoj ne bezonatas, la procezo estas tre rapida kaj ekzistas specialaj tarifoj por tio.*

**Kiaj estas la specialaj defioj de medicinaj tradukoj?**

*Unu el la defioj estas ke kelkfoje la maŝinoj ne bone montras aŭ metas malĝuste la numerojn en la dokumento. Tio estas io kion mi ĉiam devas kontroli, ĉar la maŝino ofte ne scias en kiuj lingvoj oni uzas komon aŭ punkton post milo, kaj tio tre gravas. En kelkaj tradukprogramoj oni povas kontroli aŭtomate ĉu ĉiuj numeroj similas, sed ne ĉiam. Nomoj de medikamentoj aŭ la aktiva ingredienco ne ĉiam estas tradukeblaj de ili, kaj foje estas malsamaj inter landoj. La tradukiloj ne ĉiam konas ilin kaj ankaŭ tion mi devas*

*ĉiam kontroli. La klinikaj provoj kaj la informo en medikamentpakaĵoj estas sufiĉe gravaj.*

*Por ili ekzistas ŝablonoj de la Eŭropa Unio kaj ili devas esti laŭvorte esprimitaj, mi multe ŝatas tiujn tradukojn. Tio estas defio, ĉar ili devas esti facile kompreneblaj kaj la enhavo estas tre malfacila, sed post kelkaj jaroj mi alkiutimiĝis.*

**Ĉu vi iam dezirintus esti studinta medicinon ĉe la universitato por pli bone elturniĝi pri la laboro? Ĉu vi sentas specialan respondecon en tiu rolo?**

*Se mi povus studi medicinon, mi ŝatus. Kaj ne ĉe la universitato, sed mi faris kelkajn medicinajn kursojn en Coursera dum la pandemio kaj mi tre ŝatis. Mi sentas ke mi pli bone laboras kaj malpli uzas tempon por serĉi kio estas tio kaj ĉi tio, sed mi ŝatas labori en ĉi tiu flanko, sen respondeco pri la paciento; mi povas vidi ĉion interesan el sekura distanco.*

**Kiuj estas la fortoj kaj malfortoj de tradukteknologio? Ĉu la traduko povas esti malsama depende de la tago?**

*Ĝi rapidigas multe la laboron kaj ankaŭ faciligas ĝin. Se la programo havas tradukmemoron, tiu kutime detektas se iuj klientoj volas uzi ĉiam la samajn vortojn aŭ specifajn tradukojn por iuj vortoj. Ankaŭ multajn fojojn tiuj programoj havas vortaron; la vortoj kiujn mi devas uzi en la frazo aperas en aparta parto, kaj en ripetaĵoj logike oni uzas la samajn tiel ke la teksto ne ŝanĝiĝas. Se oni ĝisdatigis la memoron, la traduko povas esti malsama laŭ la tago, kaj tio estas unu el la malfortoj; kelkfoje la teksto povas esti fuŝita de iu. Se la kompanio aŭ la kliento aŭ alia tradukisto ne scias uzi ĝin, ĝi povas enhavi multajn erarojn, do, okazas foje ke mi ricevas tekston kiun oni tradukis kun tiaj iloj kaj estas tiel malbone farita ke mi devas ko-*



menci de nulo. Sed klare, la avantaĝoj de teknologio estas multaj pli ol la malavantaĝoj, se ĉiuj faras ĉion bone, ĉar la bona versio jam estas en la memoro. La maŝintradukado funkcias tre bone en tekstoj kiuj ripetas sin multe, ekzemple informoj de la medikamentoj, ĉar en tiuj ĉiam estas samaj grandaj partoj de tekstoj. Se vi tradukas iun romanon aŭ libron vi ne povas uzi ĝin tiel, ĉar la maŝinoj ne povas senti kion volas diri la verkisto.

### Ĉu ne sufiĉus uzi Google Translate? Se ne, kial ne?

Ne, ĉar Google Translate ne ekzistas ankoraŭ en ĉiuj lingvoj kaj en kelkaj ĝi ne funkcias bone, ĉar ĝi ne havas tiel larĝan datumbazon. Por la plej grandaj lingvoj (angla, hispana, germana, franca ktp.) ĝi funkcias efike, sed pri specifaj vortoj en aliaj ne. Konsiderindas ke ĉion kion oni metas en Google Translator restas en la datumbazo, oni plibonigas ĝin per tio, kion uzantoj metas, do se estas iu konfidencia dokumento mi ne rajtas uzi. Mi ŝatus aldoni ke estas tre granda miskompreno: multaj homoj pensas ke nur pro tio, ke oni scias iun lingvon, oni povas esti tradukisto kun la helpo de Google Translate aŭ io simila, kaj tio ne eblas. Oni povas helpi sed tio ne kompareblas al la laboro de profesiulo.

### Ĉu ekzistas multaj plibonigproponoj fareblaj al la teknologio? Kion vi petus de programisto kiu dediĉas sin al ĉi tio?

Mi kredas ke tradukiloj nur povas plibonigi, ĉar oni ĝisdatigas ilin. Ankaŭ mi atendas ke eble iutage ĉiu numero estos aŭtomate ĝusta kaj la memoroj estos pli bonaj. Mi restas optimisma. Aparta nerilata temo estas ke multajn fojojn tiuj programoj bezonas interret-konekton kaj se oni perdas ĝin, estas problemo. Ekzemple, se mi ricevas dokumenton, la dosiero koruptiĝas kaj la kliento jam ne respondas, mi povas nenion fari. Kelkfoje ili sendas dulingvan tabelon en Word-dokumenton, kie mi havas la originalon kaj

” Foje ke mi ricevas tekston kiun oni tradukis kun tiaj iloj kaj estas tiel malbone farita ke mi devas komenci de nulo. Sed klare, la avantaĝoj de teknologio estas multaj pli ol la malavantaĝoj

” Foje mi subtitolas sciencajn aŭ historiajn dokumentajn filmojn kaj en tiuj kutime la maŝintradukiloj ne funkcias tiom bone, ĉar devas esti maksimume kvardek du literoj en unu linio

” Mi aktive uzas ĉiutage eble dek lingvojn

” Mi neniam estis aktiva en la esperanto-movado sed nun mi estas la unua vicprezidanto de KEJ!

la tradukon, tiam mi almenaŭ havas ion kun kio mi povas labori. Mi ŝatus ke estus io kion mi povas memfari se la dosiero koruptiĝis, memripari ĝin kaj ne atendi ke ili sendos denove, sed mi ne scias ĉu tio eblas.

### Ĉu en via studado estis specifaj fakoj pri tradukteknologio?

Jes, estis unu kurso. Mi ne multe lernis, sed en mia universitato en Islando eble la programo ne estis la plej bona. La nuntempaj lernantoj multe pli scias pri tio dum la studado, ili lernas kiel uzi multajn programojn. Mi jam lernis dum la laboro, ĉar mi laboris en tradukkompanio post mia studado kaj mi lernis laborante.

### Ĉu vi iam tradukis literaturon? Ĉu tradukistoj de romanoj taksas sciencajn aŭ alispecajn tradukistojn kiel malpli valorajn, aŭ ekzistas kategorioj?

Por mia bakalaŭra kaj magistra eseo mi devis, sed tio estas tre for de la speco de tradukado kie mi sentas min komforta. En tiu areo oni bezonas esti kreema kaj mi ne emas. Mi pensas ke ne estas hierarkio, aŭ eble nur inter la literaturaj tradukistoj. Sed estas bone ke por ĉio estas iu kapabla fari tion kaj ke ni povas rekoni niajn proprajn laborajn limojn.

### Kaj ĉu vi iam laboris kiel interpretisto?

Mi ne laboris oficiale kiel interpretisto, sed mi devis interpreti multe dum la UK en Islando, inter esperanto kaj islanda. La prezidanto de Islando venis al la UK kaj mi tradukis por li dum la solena malfermo. Kelkfoje mi faris tion sed ne oficiale ĉar estas tre malfacila. Esti interpretisto estas tute malsama afero. Ankaŭ ekzistas malsamaj manieroj interpreti. Estas tiu samtempa kaj oni devas bone koni la temon, ĉar oni ne povas anticipi kion diros la alia, kaj tiu sinsekva kie la alia paŭzas kaj oni tradukas. Mi klopodis kelkfoje.

En iu kongreso oni rajtis provi kun la eŭropuniaj interpretistoj, kaj oni metis al mi filmeton en la hispana pri skiado – estis samtempa interpretado kaj estis tre malfacile. Tio estas tute aparta. Mi aŭdis ankaŭ ke ili laboras tre malmulte, ĉar dum eble duonhoro ili laboras tiom dense ke oni devas ripozi. Mi havas tro da anxio por tio. Eble mi povus fari kun iu finno en malsanulejo ĉar mi konas la terminologion, sed en konferencoj ne.

### **Vi ankaŭ redaktas kaj subtitolas tekstojn. Ĉu en tiaj tipoj de tekstoj la helpo de tradukteknologio estas pli malgranda?**

Foje mi subtitolas sciencajn aŭ historiajn dokumentajn filmojn kaj en tiuj kutime la maŝintradukiloj ne funkcias tiom bone, ĉar devas esti maksimume kvardek du literoj en unu linio. Kelkaj klientoj sendas al mi maŝintradukitajn tekstojn sed mi devas preskaŭ ĉion korekti. En tiuj kazoj estas malpli da vortoj, sed mi elspezas multe da tempo. Kelkfoje mi tradukas ankaŭ filmetojn, kiujn oni poste dublos, sed kun tiuj mi ne devas zorgi pri longeco.

### **Ĉu finnoj tradicie estas dublema aŭ subtitolema popolo? Ĉu tio helpas vin?**

Finnoj subtitolas ĉion, ni dublas nur la infanajn programojn kaj ĉio alia restas en la originala lingvo kun subtitoloj en la finna. Tio favorigas min, ĉar mi tradukas de la angla al la finna kaj ĉio devas esti tradukita. Nuntempe mi aŭdis ke estas granda problemo ĉar oni uzas nur maŝintradukojn kaj estas multaj fuŝaĵoj en la ne-registaraj kanaloj de la finna televido.

### **Kiel oni kalkulas la prezojn en via laboro? Ĉu estas prezdiferenco laŭ lingvoj kaj landoj?**

La prezo de ajna traduko dependas de la nombro de vortoj, sed se mi nur provlegas, kontrolas maŝintradukon aŭ pere de ortografia korektilo, sen

kontroli la stilon, mi pensas la prezon laŭhore. Pro mia lingvokombino, oni pagas al mi multe pli bone ol al tradukistoj kiuj laboras ekzemple al la hispana. En kombinoj kun la hispana kaj angla estas tro da oferto kaj kelkaj akceptas po unu eŭroĉendo por vorto, kiam devus esti multe pli. Mi estas bonŝanĉa, ĉar mi apenaŭ havas konkurencon kaj ekzemple kiam mi devis traduki el la feroa al la angla mi povis mem elekti la prezon. La norvegaj tradukistoj povas peti kion ajn ili volas, ili estas la plej multekostaj (Norvegio estas ankaŭ tre multekosta lando).

### **Kiaj estas viaj laboraj kondiĉoj?**

Mi laboras mallongatempe, ĉiam temas pri tradukoj por liveri post tagoj. Mi povas alveni hejmen kaj vidi ke mi havas laboron por morgaŭ, do mi prenas taskojn konsiderante renkontiĝojn kaj farenadaĵojn, ĉar mi ne havas fiksan horaron. Se mi devas vojaĝi mi avertas la klienton dirante ke dum ĉi tiu periodo mi ne estos, sed mi neniam ferias tro longe.

### **Ĉu vi ŝatas esti memstara laboristo aŭ ĉu vi envias homojn kiuj laboras 40 horojn semajne kun kontrakto laŭ nedefinita tempo?**

Nu, en la komenco mi sentis malsekurecon ĉar mi plejparte laboris kun unu kompanio, sed nun mi havas multajn rektajn klientojn, mi certas ke ili bezonas min kaj mi fieras pri mia profesieco. Mi ne ŝanĝus al 40-hor-semajna kontrakto ĉar mi aprezas la avantaĝojn de miaj laborkondiĉoj.

### **De kie venas via pasio pri lingvoj?**

Mia patrino studis la finn-ugrajn lingvojn en la universitato, kaj ekde mia infanaĝo mi prenis de ŝi la scivolemon pri funkciado de lingvoj. Hejme mi parolis nur la finnan, sed ni havis multajn gramatikojn kaj en la lernejo mi elektis novan lingvon ĉiam kiam eblis. Mi sentas lingvistikistan intereson en

novaj lingvoj ĉar mia unua celo ne estas paroli ilin, kaj mi atendas por diri miajn unuajn vortojn, eksciinte ion pri la gramatiko. Post ol lerni kelkajn lingvojn iu diris al mi ke mi estis poligloto sed mi ne sciis kio estis tio.

### **Kiom da lingvoj vi parolas (aktive kaj pasive) kaj kiujn vi lernas nuntempe?**

Mi aktive uzas ĉiutage eble dek. Mi studis aktive eble dudek kvin, sed mi ne parolas ĉiujn. Tiuj dek estas la finna, angla, islanda, esperanto, itala, hispana, kataluna, eŭska, sveda, naŭatla kaj poste foje la germana kaj la franca. Nuntempe mi lernas la naŭatlan, la turkan kaj la japanan kaj mi perfektigas la eŭskan.

### **Ni ankaŭ volas koni vian personan kaj esperantistan flankon. Kiel vi esperantiĝis?**

Mi esperantiĝis en 2006 kun la esperanta grupo de Turku; ĝi estas malgranda sed sufiĉe aktiva kaj ili tre ĝojis ĉar venis junulo! Poste ili proponis al mi partopreni IJFn pere de registara subvencio, kaj mi iris malgraŭ mia preskaŭ nula nivelo de esperanto, sed mi multe lernis dum tiu semajno kaj mi tre ŝatis la etoson. Dum la du postaj jaroj en Usono kaj Islando mi interŝanĝis retmesaĝojn kun esperantistoj kaj ĉeestis denove IJFn. Post tio mi parolis esperanton ĉiutage ĉar mi kunloĝis kun esperantisto.

### **Kiel vi agadas lastatempe en la esperanto-movado?**

Mi neniam estis aktiva en la esperanto-movado sed nun mi estas la unua vicprezidanto de KEJ! Mi ĉiam estis tre malaktiva en asocioj. Kvankam mi trapasis la C2-ekzamenon mi neniam legis tutan libron en esperanto ĉar mi lernis ĝin aŭskultante kaj mi ne estas la plej granda ŝatanto de literaturo ĝenerale, eble ĉar mi havas problemojn koncentriĝi. En tiu senso mi estas sufiĉe malbona esperanta movadano – mi nur aliĝis al TEJO en 2018. ■

# LASTATEMPAJ ROMANOJ, DE ROMIO ĜIS DISSPLITIĜO DE SOVETIO

**Carlo Minnaja**

Akademiano, matematikisto, eseisto kaj historiisto



**L**a premiita *HEL*<sup>1</sup> alvenas ĝis proksimume 2013; de tiam pasis dek jaroj, kaj la tri ĝisnunaj represo estis nur apenaŭe ĝisdatigitaj (mikrobdimensiaj aldonetoj, enmeto de lastatempaj mortodatoj). Do por esplori kio okazis en ĉi tiu lasta periodo necesas rigardi recenzojn, aŭ universitatajn studojn (aparte interesaj estas la tiurilataj de Suso Moinhos). Sed eĉ la nura rigardo al la rubriko “laste aperis” de la UEA-revuo dismalfermas grandan abun-

don da romanoj, tial ke ĉi-paĝe estus tro longa eĉ la simpla listigo.

Pri kio ili parolas? Iuj sondas en malnovaj tempoj, iuj estas simple iom plilongigitaj rakontoj, aliaj tra la historio prezentas partan aŭtobiografion pli aŭ malpli remburitan per akcesoraj fikciaĵoj. Fakte nenio esence nova, nur daŭrigo de la antaŭa literatura fluo; eventuale nova estas la ekesto de romanoj konsistantaj el leteroj.

Pri plej malnovaj tempoj elstaras Anna Löwenstein, aŭtoranta am-

pleksan romanon preskaŭ je ĉiu jardeko, do, post *La ŝtona urbo* (1999) kaj *Morto de artisto* (2008), ŝi ree prezentas ion el la antikva Romo, ankoraŭfoje pri la medio ĉirkaŭ Nerono: *La memoraĵoj de Julia Agripina* (2021). La longan intertempon pravigas la skrupula dokumentiĝo sur fontoj ne ĉiam samdiraj, kaj iajn dubojn la aŭtorino mem adekvate elmontras. Agripina devas fronti intrigojn, konspirojn, atencojn, kiuj malhelpas ŝian ascendon al la povo, malgraŭ ke ŝi estas strikta parencino de kvar imperiestroj, eĉ patrino de Nerono, kiun ŝi sukcesis surtroni

<sup>1</sup> C. Minnaja, G. Silfer: *Historio de la esperanta literaturo*, lf-koop 2015.



malavantaĝe al iu lia kuzo. La aŭtorino ŝin priskribas historie honeste, sed kun granda homa pasio, distingante en la fontoj realajn faktojn disde iuj, kiuj povis esti registritaj kiel minusigaj klaĉoj. Löwenstein estis ĉiam sentema pri la graveco de virinoj en socio, kie la povo, potenco, decidrajto estas esence viraj; paralelan konduton ni povas vidi en la eseoj kaj intervjuoj de Perla Martinelli en *Femina* (2005-2016) aŭ en *Literatura Foiro*.

La jarcento ĉirkaŭ la naskiĝo de Jesuo allogis ankaŭ Trevor Steele, kiu, en *Paulus fondinto* (2021), verkis pri la predikado de la kristana doktrino. Saulo el Tarso, inter kristanoj konata kiel Sankta Paŭlo, ne estis kunulo de Jesuo, eĉ ne ekkonis lin, kvankam li dumvive sin ĉiam konsideris aŭtoritata predikanto de la jesuaj instruoj, almenaŭ de tiuj, kiujn li opiniis jesuaj. Lia vivo ne estis trankvila: li estis plurfoje arestita en Galileo ĉar ĝenanto de la socio, poste, ĉar romia civitano, li rajtis je proceso en Romo, kie li fakte restis fizike limigita al sia hejmo, tamen li povis prediki kaj tiel fondi organizitan kaj kongruan kristanan doktrinon. La romano estas konstruita laŭ kompilado de Ŝimeon bar Josef, frato de Jesuo, kiu kolektis tutan aron da atestaĵoj de personoj kiuj konis Paŭlon. Iuj recenzintoj ri-proĉas al Steele, ke iuj detaloj de la historio de li rakontata estas anakronismaj, almenaŭ laŭ la terminoj uzitaj, aŭ ne fidindaj, pro malkongruo kun la romiaj tiutempaj kutimoj; tio tamen ne sapeas la valoron de la verko.

*Dio ne havas eklezion* (2015) raportas pri fotoreportero, kaj en tiun figuron Steele enmetas, kiel ne malkutime, parton de siaj spertoj kaj aspirioj. Fakte temas pri amromano inter la protagonisto kaj bela filino de pastro. Du mondoj kolizias: la kapitalisma, turismindustria, kaj la fiŝkaptista socio de la vizitata (fikcia) insulo. La protagonisto, tre intense laboranta, kun la filo malproksima, devas raportiri okazinta cunamo, sed pro tro intensa laboro li kolapsas, kaj estas helpata de pastro, kiu fariĝas lia kunparol-

anto en tre intensaj diskutoj. La romano ne estas religia, kvankam la diskuto pri la diferencoj inter kato-likoj kaj animistoj vaste tuŝas pli ol unu punkton de la romano; sed certe la aŭtoro, kiu vivis longe en diversaj mondopartoj kaj konatiĝis kun diversaj religioj, enmetis aŭtobiografiajn detalojn.

La lasta romano de Steele, nun finredaktata sed ankoraŭ ne aperinta, traktas pri la azilpetantoj, kiuj venas al Aŭstralio kaj estas plusendataj al tropikaj insuloj, sen indiko pri kiam iu ŝtata strukturo interesigis pri ili. Tia nehumana traktado kaŭzis ankaŭ tragediojn. Steele estis ĉiam tre sentema al personaj suferoj kaŭzataj de koloniigo (vidu: *Paradizo ŝtelita*, 2012); li perfekte taŭgus kiel kandidato al la Nobelpremio, verkinte dek tri tre edifajn romanojn kaj plurajn novelojn. Ĉu la esperanta PEN-centro aŭ la Akademio Literatura de Esperanto kuraĝos lin proponi?

En ĉi tiu lasta jardeko ni trovas ankaŭ romanojn kiuj estas parto de nia specifa kulturo, de la esperantista “popolo”, termino nemiskompreneble uzata ekde la komenco de la pasinta jarcento, aŭ “memelektita diaspora lingva minoritato”, laŭ la difino de la Manifesto de Raŭmo (1980), aŭ “lingva grupo”, kiel esperantistoj povas enkadriĝi laŭ la “Deklaracio de lingvaj rajtoj” (Barcelono, 1996). Temas ja pri romanoj kiuj parolas pri ni esperantistoj.


Preterlasante *Mi stelojn jungis al revado* (2016) de Mikaelo Bronŝtejn, gajninto de la akademia Laŭro por la jaro 2021, jam pritraktitan en ĉi tiu revuo, romano parte aŭtobiografia estas *La liberiĝo* (2019) de Eva Tófalvy: paro da geesperantistoj renkontas amason da ĝenoj pensante pri vivo en Hungario aŭ en Ĉeĥoslovakio, landoj tiutempe (en la 1970aj) sub la premo de diktaturo. Kiu tiun reĝimon ne travivis lernos multe pri la bonŝanco esti ĝin evitinta, eĉ se iom tedas la grandparta traktado ĝuste de tiu obseda premo.

Jen ni havas ankoraŭ de Steele aŭtobiografiajn, post la du volumoj de la *Fotoalbumo* (2009 kaj 2015, kun *Apendico* en 2019): *Amo inter ruinoj* (2016). Estas la jaro 1990, jaro tumulta en Sovetio, trapasanta de la lastaj gorbaĉovaj tagoj al la displitiĝo de la imperio. Aŭstralia ĵurnalisto, komunisto, forlasita de la edzino, venas al Ukrainio por sperti persone kiel oni vivas en la orienteŭropa komunista mondo, kie li havas plumamikinon; li ekkonas ankaŭ ties amikinojn, kiu parolas en la estona radio, kaj ĉirkaŭas lin tuta aro da aliaj personoj, parencoj, duonamikoj, esperanto-klubanoj. Kio restis el tiu ŝtata konstruaĵo ankoraŭ potenca en la 1970aj, el tiuj egalecaj idealoj, al kiuj ankaŭ esperantismo (kaj ĝiaj orienteŭropaj asocioj) sentis sin ligita? Eksplozas naciismoj kaj de Ukrainio kaj de la Baltaj Landoj; ĉiuj volas ion ŝanĝi, sed scias nek kion, nek kiel.

Interesa la diversopinia kritiko pri ĉi tiu verko: Stanislavo Belov tute draŝis ĝin per longega recenzo en *Monato* kaj Valentin Melnikov samis, kvankam pli kurte, en *Beletra Almanako*. Verŝajne la du rusoj, kiuj ja travivis la tiutempajn situacion, estus postulintaj alian interpreton de la faktoj, kiuj ne konfuziĝu kun la fikcio de la rakonto. La aŭtoro mem, responde al recenzo, komentariis, ke li tute fidele raportis, kion de la surlokalaj konatoj li estis aŭdinta. Alia recenzanto en la *Esperanto-Sumoo* (el la siglo PSV: brazilano Paulo Sergio Viana) taksas ĝin bonega per valoraj argumentoj; do, preter disopinioj, leginda historia romano kun esperantistoj kiel rolantoj.

Esperantisto estas ankaŭ Bjørn, la protagonisto kaj deekstera alestanto/rigardanto en *Sesdek ok* (2020), de Sten Johansson, gajninta la laŭron de la Akademio por la jaro 2022; sveda studento loĝas dumsemestre en Parizo, kie li denove renkontas danan junulinon, Dani, ekkonitan dum SAT-kongreso. Kompreneble la allogo estas reciproka, kaj Bjørn ne havas rimorson en la forlaso de la fianĉino restinta en Svedlando, sed





transiĝinta al alia universitato kaj aliĝinta al la maŭista politika fluo; al ŝi li, post sia rehejmiĝo, sendas leterojn raportantajn pri la tiujara vivo en Parizo, kun la urbaj studentaj manifestacioj, kaj tiu leterado estas ja la strukturo de la romano.

Samaŭtore aperas *Secesio* (2021), rakontanta pri la apartiĝo de artistoj for de la rigida moralo tiutempa (tria kaj kvara jardekoj de la pasinta jarcento, en Vieno): sincera amo inter du virinoj, Louise kaj Willi, devas sin kaŝi, kaj tio trovas elturniĝon tra la kunesto kun la riĉa Johnny, ankaŭ samseksulo, amiko de Willi. Legi nun pri malfacilaĵoj pro la propra seksa orientiĝo rekondukas nin retroen ĉirkaŭ jarcenton, kvankam eĉ nun ankoraŭ ne ĉiulande samsekseco estas konsiderata simple unu el la normalaj seksaj orientiĝoj. La mesaĝo transdonita de la romano estas averto ankaŭ por nuntempuloj. Cetere virina samsekceso estis traktata ankaŭ en antaŭaj romanoj de Johansson.

Leteran stilon prezentas *Opuntioj* (2021) de la nun 93-jara maltano Carmel Mallia. Temas pri leteroj verkitaĵ de pluraj maltanoj al samnaciono kiu delonge loĝas en Parizo; li neniam respondas, eĉ ne rekte legas ilin pro blindiĝo, sed nepo ilin legas al li. La

leteroj rakontas pri kio okazas en la insulo (fikcie nomata "Bonveno"), entute amaso da interesaj faktoj: iu juna paro, Ramon kaj Lola, organizas maljunulejon, Ramon iĝas muzikisto kaj politikisto, Lola forpasas ankoraŭ juna, okazas pafmortigo (tamen neklarigita flankajo ene de la romano); iu statuo de la Madono proponas misteron. Kial tiu titolo? Ĉar opuntio havas dornojn surŝele sed estas dolĉe pulpa en la interno: se oni ne rompas la ŝelon, alegorie, la Malbonon, oni ne atingas la Bonon.

Restrikta spaco permesas doni nur apenaŭn mencion al aliaj romanoj. En 1919 en la aŭstralia provinco Kvinslando prezentiĝas tuta kriso-lo da etnoj: britoj, surmetiĝintaj al la indiĝenoj jam antaŭ jarcentoj, kaj postaj alvenintoj diversoriginaj, rusoj, judoj, japanoj. *La sangoruĝa flago* (2020), ankoraŭ de Steele, rakontas pri du partioj, el kiuj unu predikas pri elpelo de rusoj, judoj aŭ alinacianoj, dum alia, orbitanta ĉirkaŭ la revuo *La ruĝa flago* kaj la *Centro de Rusaj Laboristoj* kolizias surstrate kun la policaj barikadoj kaj kun la rotoj de revenintoj de la eŭropaj militfrontoj. Protagonistas bela kaj inteligenta knabino kaj same fizike alloga junulo, kiu pro sia politika agado estas kaptita, kaj la ino ruze agadas por lin liberigi: politikaj ideoj jam ne plu gra-

vas, kaj la streĉa historio antaŭeniĝas eĉ tra jardekoj.

La tre densa produktado de la lasta jardeko far bulgaro Julian Modest (pseŭdonimo de Georgi Miĥalkov), nuna prezidanto de la Esperanta PEN-centro, estas ege abunda: naŭ romanoj, ĉefe krimromanoj, kaj ses novelaroj. Eble ili ne klasiĝas inter la epokfaraj verkoj, sed same delectas pro iuj konstante ripetiĝantaj trajtoj: bone karakterizitaj estas la ĉeffiguroj (kutime junulinoj kun blondaj haroj kaj lazuraj okuloj), la kolizio inter generacioj, la scenejo preskaŭ ĉiam sama en lando nedeklarita, sed kiu travidigas la bulgaran socion, sufiĉe tradician. La kulpulon de la krimo oni ne tuj intuicias, kiel en pli ŝablona trajnlegataj romanoj, kelkfoje eĉ la solvo de la polica enketo estas lasata al la leganto, kiu povas mem konstrui epilogo. Sed ne ĉiuj estas krimromanoj: tre kortuŝa estas *Tra la padoj de la vivo* (2020), en kiu la sindediĉo al filino Lili far ŝia patrino Eva estas vere absoluta.

Konklude abundo, bedaŭrinde bremsata de konstante povra merkato, sed plu daŭras verkistaj talentoj, kiuj produktas ĝuindajn legaĵojn, kaj kuraj eldonejoj, apogindaj per saĝa aĉetado. ■

# LA NEPOJ NIN BENOS...



**Valentin Melnikov**

Membro de la Literatura sekcio de Akademio de Esperanto

**Z**amenhof siatempe skribis, ke “Lingvo Internacia fortikiĝos (...) nur (...), se ekzistos ia grupo da homoj, kiuj akceptus ĝin kiel sian lingvon familian, heredan. Cento da tiaj homoj estas por la ideo de lingvo neŭtrala multege pli grava ol milionoj da aliaj homoj”. En la mondo estas kelkaj miloj — neniuj scias precize kiom — da homoj, al kiuj bonŝancis havi Esperanton kiel denaskan lingvon. Mi persone konas dekon, eble estas pli — ja se la homo mem ne diris pri tio, kutime ne eblas distingi inter denaskulo kaj iama kursfininto.

Do tamen, denaskuloj gravas. Ni scias ĝenerale, ke por subteni lingvoscion, oni devas konstante praktiki. Ne nur en interparoloj, sed ankaŭ per legado. Infanoj, denaske parolantaj Esperanton, bezonas librojn konvenajn por sia aĝo. Kiel statas la afero?

Por la plej etaj infanoj en ĉiuj lingvoj oni produktas librojn kun grandaj belaj bildoj kaj nur kelkaj vortoj sur ĉiu paĝo. En 1980aj jaroj aperis pluraj belaj libretoj el Ĉinio, samaj libroj aperis en diversaj lingvoj. Fakte, eĉ se tiaj libroj en Esperanto nun ne troveblas, la gepatroj povas facile mem fari ilin: surglui vortojn en Esperanto super aŭ apud la nacilingvaj.

Infanoj 5–8 jaraj jam komencas legi mem, ili bezonas simplajn mallongajn

versaĵojn. Tiajn iam verkis Ludmila Jevsejeva (USSR) — “Donacetoj por infanoj” (1994)\*, nun la samspecajn verkas Elena Popova (Bulgario). Certe ankaŭ tiuj libroj devas havi belajn ilustraĵojn — kolorajn aŭ konturajn, kiujn infano povas kolorigi mem. Ankaŭ mallongaj simplaj rakontoj, fabeloj: en lastaj jaroj estas eldonitaj “Renkontoj kun mirakloj” (2021) kaj “Mi, Roki” (2022) de Elena Popova, “Mirakla fabelo” (2021) kaj “La pirata insulo” (2022) de Julian Modest. Aparte menciindas “Amuza alfabeto” (2016) de Elena Popova, kiu bone helpas al infanoj lerni legi kaj skribi.

Por iom pli granda aĝo bonas noveloj-fabeloj de Luiza Carol — aperis kolektoj “Tikiriki Tok el Strobilo” (2017) kaj “Rakontoj por ĉiuj aĝoj” (2009, represo 2018). Ĉarmaj fabeloj troviĝas en “Viveroj” de Lenke Szász (2019). Nepre menciindas “Steĉjo-Fabeloj” de Júlia Sigmond (2018).

Infanoj 10–12-jaraj kaj pli aĝaj (ne nur denaskuloj, ankaŭ lernantaj mem sendepende de la gepatroj) jam povas legi la revuon “Juna amiko” (aperas trifoje jare). Por ili ekzistas libroj de Mikaelo Bronŝtejn “Mamutido Miĉjo” (unua eldono 2000, kelkaj represo poste), “Pri Dinjo, Diko kaj aliaj estaĵoj” (2011). Certe menciindas vaste konataj libretoj de Claude

Piron — “Gerda malaperis!”\*, “Lasu min paroli plu!”\*, “Ili kaptis Elzan!”\*, ĉiuj plurfoje reldonitaj. Ankaŭ la vera klasikaĵo — “La verda koro”\* de Baghy. Tamen la laste menciitaj libroj celas unuavice ne denaskulojn, sed memlernantojn — tio estas specifa unika ĝenro, ekzistanta nur en Esperanto: “instrua romaneto”, konsistanta el mallongaj ĉapitroj-lecionoj, kun dekomence tre simpla grammatiko kaj limigita vortostoko, tamen en ĉiu nova ĉapitro estas aldonataj pliaj elementoj. Atentokapta intrigo helpas diligente lerni la lingvon. Al la sama speco apartenas malpli konata “La juna verkisto” de Sylla Chaves (1999, entute aperis sep libretoj en la serio “Facilaj legaĵoj”). Aparte menciindas fabeleca, sed esence instrua, eĉ sciencpopulara “La bona pineto” de Geraldo Mattos (2008, reldono 2016).

Certe ekzistas multaj bonaj Esperanto-tradukoj de nacilingvaj porinfanoj libroj — ankaŭ ili utilas kaj nemalhaveblas. La Katalogo de UEA ĉi-momente (19 feb 2023) en la kategorio “Simplaj legaĵoj kaj infanlibroj” havas 145 titolojn. La libroj, ĉi-supre markitaj per asterisko (\*) troveblas en la interreto kaj legeblas/elŝuteblas senpage.

Agrablan legadon! ■

## POEZIA ANGULO

# UNA PARAULA QUE HA ROMÀS GRAVADA

**Nicolau Dols**

lingvisto kaj poeto

Eldonejo Proa ĵus publikigis *Un llum que crema*, la libron pro kiu Jordi Llavina (Gelida, 1968) ricevis la unuan premion en konkurso Carles Riba 2022. Ĉi tiu malferma poemo de la libro estas medito pri la sugesta kapablo de ŝipnomo reveninta el la marfondo jarcenton post sia drono. Temas pri la vorto “Endurance” (angle ‘daŭreco’), nomo de la ŝipo de Ernest Shackleton, la brita esploristo de Antarkto. Jen originalo kaj esperantigo de la poemo.

Una paraula que ha romàs gravada  
–perfectament llegible, substantiva–  
damunt la fusta d’un passamà.  
Així, una efigie del món romà:  
l’encuny d’una moneda descolgada,  
l’expressió d’un nom d’accent august.  
O bé el lligall –espès de lletra– d’un escriba.  
Sentim, de cop, l’esclat del temps (si Proust  
alcés el cap!): el nom, que fa la cosa,  
torna a sortir a la llum al cap de més  
d’un segle d’haver estat sota la llosa  
de tres mil metres d’aigua de mar fosca.  
Lligall, moneda, nom: quanta memòria  
que han fet incògnita un oblit d’arxiu,  
tombes de terra i aigua... Si no fos que  
havia de sorprendre’ns, vell de glòria,  
allò que creïem mort i ara és ben viu!

Ankoraŭ restas vorto gravurita  
–tute legebla nun kaj sencoplena–  
sur la ligna surfaco de manrelo.  
Ĝi similas al busto romiana  
de antikva monero elfosita  
kun la belsono de majesta nomo.  
Eble al iu densa skribulaĵo.  
Subite eksentiĝas tempoknalo  
(ho, Proust!): ekflosas kreipova nomo,  
post jarcento denove stariĝanta  
de sub tombŝtono peza pro la premo  
de trimil metroj da malluma maro.  
Skribulaĵo, monero, nomo: kiom  
da memoro perdiĝis pro forgeso,  
teraj aŭ maraj tomboj... Tamen foje  
surprizas nin ankoraŭ glorkovrita  
kio mortinta ŝajnis kaj pludivas! ■





# HAVANAJ OMBROJ

**Alfons Tur**

Membro de KEA kaj denaska esperantisto



ARTTOWER

**K**evin Black sentis la tropikan varmon, kiu envolvis lian tutan korpon dum li descendis la ŝtuparon de la aviadilo je lia alveno al la Internacia Flughaveno José Martí, en Havano. La humideco de la aero ŝajnis leki lian blankegan haŭton kaj tuj ŝvitigis lin tra ĉiuj poroj. Dum li vicis por la dogankontrolo, la klimatizilo apenaŭ sukcesis mildigi la temperaturon. Li, do, formetis la jakon, malstreĉigis la kravaton kaj eksenesperiĝis. Li komencis penti, ke li akceptis blinde la proponon de la direktoro de lia entrepreno esplori la eblecojn establi delegitejon en Kubo antaŭvidante la forigon de la usona blokado.

Li pretis uzi siajn rudimentajn konojn de la hispana lingvo, kiu kune kun kronika stomakdoloro pro la tro spicita manĝaĵo estis la sola postrestaĵo de la jaro dum kiu li laboris en Meksikurbo. Kiam lia vico alvenis, la dogan-oficirino, bela mulata virino kun bruna longhara tufo kaj mielkolora haŭto, petis lin pozi por kontrolfoto. Li rektigis la kolon, forviŝis la ŝviton de la frunto, kaj provoke ridetis al la policistino dum li mordetis la suban lipon.

— Bonvolu rigardi la kameraon, kaj ne min! — admonis la policistino.

Kevin tuj seriozigis la mienon kaj obeme redirektis la okulojn al la objektivo.

— Kialo de via vojaĝo al Kubo, ĉu negocoj? — ŝi demandis protokole.

— Efektive, tamen mi neniam ekskludas la eblecon trovi momentojn por aliaj aferoj pli plezurigaj.

Li respondis inciteme, sed la virino jam atentis la sekvan homon en la vico, sigelis lian pasporton senatente kaj, dum ŝi redonis ĝin, iom pli laŭte sed ne rigardante lin informis:



— Alproksimiĝas uragano, mi konsilas ke vi iru rekte al via hotelo kaj evitu la malnovajn konstruaĵojn, la risko de disfalo estas granda.

La indiferenteco de la policistino senluziigis lin tuj. En lia kapo jam svarmis ideojn diverspoze amori kun tiu mulatino kaj uzi en ŝia volupta korpo la specialajn ilojn, kiujn li portis en la fundo de la valizo. Krome pensi ke li, usona manaĝero povus sekse subigi ŝin, kuban militiston, donintus al tiu aventuro apartan valoron. Oni eĉ devus doni al li la medalon de la Kongreso...

Dum en lia kapo bolis liaj malĉastaj pensoj, li rimarkis afiŝon kun la skribo “Rent a car” super malnovaspekta servotablo, kie deĵoris iu afable ridetanta lipharulo en mallongmanika blanka ĉemizo. Kevin alproksimiĝis kaj petis:

— Mi volas aŭton, Lamborghini!

— Lambo... kio? Respondis la komizo surprizite.

— Lamborghini, mi diris! Li insistis pli laŭte.

— Aŭskultu kompano, eee, sinjoro, pri kio temas tiu Lambo... mi ne scias kion?

— Ne gravas — li daŭrigis dum li kombis siajn brovojn per la fingropintoj— Mi volas la plej bonan aŭton pri kiu vi disponas, mi pagas la kvinoblon de ĝia prezo... Nepre kabrioletu, tamen. La komizo tuj prenis la parolilon de la telefono kaj telefonis, insistis, markis diversajn numerojn, kroĉis denove kaj demandis la gravan klienton:

— Dum kiom da tagoj?

— Tutan semajnon— li respondis.

La lipharulo denove dekroĉis la telefonon, videble nervoza.

— Jes, kolego, sendu al mi la plej bonan, nepre kabrioletu!... Se ĝi havas tegmenton fortranĉu ĝin!

Post kelksekunda atendo li diris:

— Audi TDi kaj kabrioleta versio? Nepre portu ĝin al mi, flugu!!

Kevin Black surmetis siajn luksajn sunokulvitrojn “D&G” kaj akcelis la veturilon laŭ la avenuo Rancho Boyeros. Li ĝuis la venton, kiu kombis lian blondan hararon kaj mildigis la tropikan varmegon. Kiam li atingis la straton 100, semaforo devigis lin halti. En la apuda koridoro unu el tiuj usonaj kamionoj de la kvindekaj jaroj kun soveta motoro de la sepdekaj centfoje riparita kaj revivigita kiel metala Lazaro allasis densan nigran fumnubon, kvazaŭ furzeĝo, kiu envolvis kaj tusigis lin. Li ne atendis la lumŝanĝon de la semaforo, abrupte startis, akcelis ĝisfunde, ŝanĝis la koridoron kaj daŭrigis la ĉemaran promenadon.

Lia sporta aŭto, tute nova kaj moderna, aspektis kiel spacoŝipo meze de la mornaj usonaj veturiloj antaŭrevolucaj kaj la eksmodiĝintaj orienteŭropaj, tial li altiris kelkajn rigardojn de la malmultaj preterpasantoj, kiuj kuretis kaj klopodis protekti sin de la hurlanta avangardo de la uragano.

La malmultnombra kaj preteratentema publiko vundis lian vantecon. Li deziris vekigi miropolenajn rigardojn. Li esperis kriojn kaj svarmon de amozpetantaj senŝuaj infanoj... Ve, aĉaj komunistoj ili murdis poezion!

La sencela veturado komencis esti ĝiĝi teda. Fakte li, kapricema kaj petolema bonhavulo, malhavis paciencon tiel ke nenio kaj neniu tenis longe lian atenton. Kiam li jam pretis serĉi la vojon al la hotelo, laŭ la indikoj de la komizo de la aŭtoluejo, li ekrimarkis belan virinon sidantan tute sola, en Malecón sub la lastaj sunradioj, kiuj kvazaŭ sorĉe trapasis la nigrajn nubojn kaj kreis nerealan bildon; ŝi ŝajnis defii la potencajn ondojn de la oceano kiuj ŝprucis salakvaj gutegojn sur la kajon.

Li forte reduktis la rapidon por alparoli la belulinon kaj haltigis la aŭton

apud ŝi. Li tuj rekonis la policistinon de la flughaveno, civile vestita tamen.

— Saluton karulinjo!

— Ĉu ni konas nin? Ŝi demandis.

— Eble. Li respondis kun unu brako sur la stirrado kaj la alia sur la dorŝapogilo.

La junulino havis longan brunan hararon, brilante mielan haŭton kaj surportis striktajn pantalonojn kaj senmanikan bluzon, kiu elstarigis ŝiajn inajn formojn.

— Venu! — ŝi ordonis— Vi povas parki la aŭton ĉi tie mem, neniu ĝin ŝtelos.

Li prenis sian tornistran kaj sekvis ŝin dum voluptaj pensoj venis al lia cerbo kaj okupis lian tutan menson, tiel ke li ne rimarkis tra kiuj pasejoj, stratoj kaj stratetoj de centra Havano lin ŝi gvidis. Subite estiĝis mallumo, la publikaj lumfostoj paneis pro la uragano kaj li apenaŭ kapablis distingi unu fasadon disde la alia. Li ne timis perdiĝi, certe li iel sukcesus trovi la vojon al hotelo, sed li ne volis perdi sian predon.

Post longa trotado ŝi haltis ĉe pordego de iu konstruaĵo, kiu devis datumi de la kolonia epoko, puŝis la lignan pordon kiu forte knaris; eble ĝi plendis ke oni laborigis ĝin en tiu horo aŭ eble kiel averto... Ili supreniris malnovan ŝtuparon plurfoje stumblante pro la difektitaj aŭ mankantaj ŝtupoj, fine ie, ŝi montris ĉambron kiu malfermiĝis dekstre de la koridoro. Ĉe la maldekstra muro troviĝis hispanstila lito kies kapo estis el fortaj feraj stangoj, laŭ li povis diveni pli ol vidi, ĉar en la ĉambro nur tintilis kelkaj kandeloj sur la planko kaj la okaza heleco de la fulmoj kiuj lumigis la tutan ejon dum apenaŭ sekundo. Iu kaptis mallonge lian atenton, li aŭdis pepadon kaj lignoskrapado, etajn paŝetojn freneze irantajn ien super iliaj kapoj, tamen li ne kapablis identigi pri kio temas. Nenio gravis, lian

atenton monopolis la kurboj de tiu kariba virino, kiu komencis senvestiĝi kaj montri sin kiel Evo en la paradizo antaŭ la pommanĝo. Li reciprokis kaj baldaŭ ili rulis sur la lito, kiu kvankam grincanta bone rezistis iliajn ritmajn skuadojn kiuj ŝvitigis lin kiel neniam antaŭe.

Tradicia amorado, eĉ se kun eksterordinara virino, en antikva palaco (aŭ tia li ĝin imagis), en tenebroj fenditaj senĉese de fulmoj, vento hurlanta en kaj ekster la domo kaj knariganta ĉiujn trabojn ne sufiĉis por kontentigi lin. Li nepre sentis la bezonon estri, mastri ŝin. Li profitis momenton de ripozo de tiu amorbatalo por traserĉi palpe en la tornistrion, kaj sukcesis kapti kion li celis: jen la mankatenoj, bonege!

Li tenis la du mankatenojn per la maldekstra mano kaj karesis ŝian manradikon per la dekstra, pensante ke li facile venkos ŝian reziston, se tiu estus... Sed kiam ŝiaj brunaj okuloj rimarkis la senmovigilon, tuj ŝia milita preparo vekigis kaj per rapidega movo ŝi kaptis ambaŭ mankatenojn, lokiĝis malantaŭ li, gluis la bruston al lia dorso senmovigante lin kontraŭ la matraco kaj katenis liajn manojn al la ekstremaj stangoj de la litokapo.

En nur kelkaj sekundoj li pasis de kaptonto al kaptito.

Tio estis tiel nova por li ke tuja reago estis neebla, kiam lia menso sukcesis asimili la okazintaĵon, li restis sola en la ĉambro, ĉar la mistera mulatino forlasis lin meze de sennombraj karibaj sakroj kaj insultoj.

Kion fari? Ĉu krii kiel virino por peti

helpon? Sed kiu aŭdus lin? Krome tiu pozo estis konvena por ino aŭ ineculo sed hontinda por masklo kia li.

Li svingis la brakojn, tiris de la mankatenoj, tordis ilin sed liaj klopodoj estis vanaj. La feraj stangoj de lito kiu rezistis la kolonian militon, la usonan invadon kaj la revolucion ne volis cedi al simpla kapriculo. Liaj manradikoj nur difektiĝis kaj eksangis, dum li daŭre aŭdis tiun strangan frenezan pepadon. La pordo de la ĉambro, puŝita de la forta ventego, kiu enfluis tra la fenestro, batadis senĉese kaj abrupte.

Sur lian haŭton falis gipsopecoj de la knaranta kaj pepanta plafono, kiu kurbigis je ĉiu forta ventoblovo.

La tempo pasis, la fulmoj ŝajnis iom cedi kaj la vento mildiĝis. Subite la pordo tute malfermiĝis kaj iu ombro eniris la ĉambron. Li rigardis malantaŭ sin kaj apenaŭ li distingis malhelan korpon kaj du eburblankajn okulojn, sen ebleco diri vorton, li sentis fortan manon kiu kaptis lian dekstran femuron kaj alia tuj poste la maldekstran, nur sekundon poste li sentis enorman virilon kiu bugris lin ĝisfunde. Li kriis, ĝemis, sakris en ĉiuj lingvoj de li konataj, sed vane. La afero progresis ĝis kiam, de ekstere aŭdiĝis alarmilo, kiu avertis, ke la zenito de la uragano atingis la urbon. La ombro tuj foriris, saltis el la lito, kaj descendis la ŝtuparojn rapidege lasante lin denove sola, malpura, bugrita kaj jam definitive venkita, humiligita. Li nur deziris morti, ke tiu ruino disfalu kaj kovru lian korpon kaj lian honton, ĉar ne eblis plia humiligo... aŭ li tion kredis.

Post forta tondrobato, ventego frapis kontraŭ la fasado de la konstruaĵo kaj envenis tra ĉiuj fenestroj kiel infano blovas en balonon. La ventego inundis ĉion, la muroj iom suferis tamen rezistis, la tegmento maledis kaj pagis nur la prezon de la perdo de kelkaj tegoloj kiuj trafis la malplenan trotuaron, sed la plafono de lia ĉambro, kiu estis samtempe la planko de mansardo, fine cedis al la impeto de la uragano. La putriĝintaj traboj kreviĝis, disfalis la gipso kaj la kaĝoj de la kokinejo, ĉar tio estis la mansardo ekde la malfacilaj jaroj de la "speciala periodo". Kokinoj freneze klukan-taj, malpura pajlo, kaĝoj dispecigitaj, ovoj, kokina sterko kaj plafoneroj falis sur la liton al kiu li estis katenita. La malpura gipso malregule farunis lian blankan haŭton, la kokina fekaĵo algluiĝis dise sur lia korpo, la ligneroj vundis kaj sangigis lin.

Efektive plia humiligo eblis.

Kiam la unuaj sunradioj de kvietamatenio lumigis la ĉambron, la ĉefo de la civilserva brigado kiu reviziis la difektitajn domojn de tiu kvartalo (kaj kiu hazarde estis la nokta ombro kiu vizitis lin) atingis lian ĉambron kaj trovis lin katenita, vundita, surfekita, kun kokino dormanta sur lia dorso kaj kokido kiu klopodis piki lian kacon, kiun ĝi kredis stranga vermeto.

La bildo estis tiel ŝoka ke la brigadano nur sukcesis balbuti:

— Fi, kompano, eĉ kun kokinoj... ĉu nenio satigas vin? ■



Lola Casas

## Poemes, relats i marietes Poemoj, rakontoj kaj kokcineloj

Trovu ĝin en [butiko.esperanto.cat](http://butiko.esperanto.cat)





# UN VIATGE PER L'ABYA YALA DE L'EXILI A L'AVENTURA

**Bernat Guàrdia i Ramon**

Estudiant de Musicologia a la Universitat Autònoma de Barcelona



ANNA I JOSEP TRAVESSET-ROSSELLÓ

Brasil 1961

**E**l terme *Abya Yala* es pot traduir com a “terra fèrtil” o “continent de la vida” en la llengua dels kuna. És el nom amb el qual aquesta ètnia ha designat tradicionalment el mal anomenat Nou Món, molt abans que els europeus el bateguessin amb el títol amb què se'l coneix avui dia: Amèrica.

D'entrada pot semblar que Abya Yala és un antic topònim en desús. Això no obstant, el seu reconeixement entre les comunitats i organitzacions indígenes és notable i el seu emprament és un acte de rebuig al nom que la seva terra va rebre per part d'aquells qui la van envair. El 1992, el líder aimara Takir Mamani

convidava les nacions originàries a fer servir el nom d'Abya Yala en tots els àmbits, tot defensant que anomenar els seus pobles, ciutats i territoris amb noms que van estar imposats per estrangers només contribueix a perpetuar la submissió de la seva identitat a la voluntat dels invasors i els seus hereus.



Guatemala 1963

Accions com aquesta sovint són discutides i tractades de radicals o innecessàries dins el context actual en què impera la globalització i la modernitat, normalment des de sectors privilegiats, invalidant així la resistència d'un gran nombre de nacions que encara lluiten pels seus drets. Aquest tipus de normalització de la submissió cultural és un problema molt invisibilitzat i massa comú, no tan sols en l'àmbit americà, sinó també a la resta del món. Dins d'Europa existeixen molts casos de nacions sense estat que, igual que els pobles originaris de l'Abya Yala, no són reconegudes ni visibilitzades internacionalment com a cultures diferenciades, la qual cosa afavoreix la seva minorització identitària, lingüística o social.

Aquesta darrera comparació i connexió entre la submissió cultural que pateixen els pobles minoritzats d'Europa i la problemàtica indígena al continent americà ha estat un tema recurrent, però poc valorat, entre diversos catalans que han experimentat una implicació directa dins el moviment de la resistència indígena. Si guin exiliats, comerciants o viatgers, el contacte amb la lluita per les llibertats dels pobles ha esdevingut un procés de conscienciació que els ha permès veure el problema català des d'un punt de vista més aviat antropològic, deixant de banda les banalitats polítiques del pensament occidental.

Qui també es va adonar d'aquesta semblança entre dues lluites tan llunyanes, en experimentar-ho en

persona, va ser la família Traveset-Rosselló, la història i feina de la qual ha estat molt mancada de reconeixement, per no dir gairebé oblidada. Es tracta d'un matrimoni, l'Anna i en Josep, i la seva filla Carme, que es van exiliar al Brasil el 1956, i que després de tres anys de planificació, van viatjar durant aproximadament cinc anys per l'Abya Yala, quatre d'ells en una tartana, coneixent i relatant les injustícies que presenciaven i els problemes que els explicava de primera mà cada comunitat indígena amb què coincidien en el camí. Van fer tres viatges destacables, els quals van narrar de forma literària en un total de vint-i-dos llibres.

Vaig descobrir la seva gran aventura, i els seus llibres descatalogats, d'absoluta casualitat. De fet, no recordo ni com va ser, però tot d'una em trobava llegint-ne un article d'en Joan Inglada, amb qui vaig contactar ràpidament. Aquella mateixa nit, vaig sortir de casa per anar a una antiga cabina telefònica del meu poble que recentment ha estat convertida en una petita llibreria col·lectiva d'intercanvi, i per sorpresa hi vaig trobar dos dels llibres de la família Traveset-Rosselló. Va ser tal la coincidència que, malgrat que no hi crec, em va semblar un senyal del destí.

Ara ja fa uns anys que, per llei de vida, l'Anna i en Josep ja no són amb nosaltres, però gràcies a en Joan Inglada, vaig aconseguir parlar i quedar amb la Carme, la seva filla, qui també va viure totes les peripècies a bord del "cotxe-llar" a través dels infinits i ancestrals camins de l'Abya Yala, quan tan sols era una nena. El seu marit Francesc i ella em van rebre amb els braços ben oberts a casa seva, oferint-me coca casolana i un got de ratafia. Vam parlar de moltes coses, i no només del nostre tema estrella, sinó que també vam encetar converses sobre música, art, ruralitat, orígens... A més a més, em van ensenyar articles de diaris sobre el gran viatge i les poques fotos que en conservaven. Ara bé, el més gran obsequi que em podrien haver fet va ser regalar-me la col·lecció com-

pleta dels llibres que l'Anna i en Josep havien escrit, i que com ja havia pogut comprovar, eren gairebé impossibles d'aconseguir. Després de la trobada, només d'entrar al tren per tornar cap a casa ja m'havia endinsat en les paraules de *l'Amèrica Marginada*, la lectura principal i més bàsica per entendre i ordenar mentalment els quatre anys de ruta amb el "cotxe-llar" per l'Abya Yala, ja que fins aleshores, poca informació n'havia pogut obtenir.


Des de l'experiència, puc assegurar que els meus ideals han anat patint aquest desenvolupament del qual he parlat anteriorment, el procés d'empatitzar i descobrir què és la germanor entre colonitzats de la qual tant parlava la família Traveset-Rosselló. Tot va començar quan per atzar vaig acabar viatjant de motxiller per l'interior de la costa atlàntica del Brasil, on vaig conèixer fills de cultures originàries amb qui vaig mantenir grans converses sobre tots aquests temes, i em vaig sentir plenament identificat amb la major part de problemes als quals eren sotmesos. Amb un bon amic del poble Wajãpi, vam concretar que segurament, la principal qüestió que ens diferencia és el nostre privilegi de ser europeus, de tenir seguretat i un mínim de visibilitat. En altres mots, que avui dia és poc probable que algú ens mati pel fet de ser catalans, i que ningú se n'assabenti. Allà, per altra banda, s'arrassen poblats sencers i no se'n fa ressò.

És per això que, d'ençà que vaig començar a comprendre tots aquests aspectes, sempre convido a tothom a obrir la ment, a respectar i empatitzar amb totes les nacions del món, i desfer-se d'aquest pensament etnocèntric i globalitzador que promou el supremacisme d'uns pocs estats dominants. Aprofitant que el món ens mira, els catalans hem de donar visibilitat a aquesta qüestió tan perillosament silenciada, i donar suport a tots els altres pobles oprimits que, com nosaltres, encara lluiten per la llibertat i la diversitat cultural. Perquè al capdavall, ser diferents és el que ens fa ser humans. ■



# EKZILIĜI POR EVITI MALLIBEREJON

Joan Inglada Roig  
Membro de KEA



**N**e-esperanta filologo, dum la esplorado por sia doktora tezo malkovras la neeldonitan ege interesan verkaron de la grava pionira esperantisto Frederic Pujulà i Vallès (1877–1963), kiu same kiel, en 2017, la prezidanto de Katalunio, Carles Puigdemont, devis ekziliĝi, por eviti esti malliberigita. Ĉi-kaze, dufoje: en 1905 pro la “incidento de *Cu-cut!*” kaj en 1923 pro la diktaturo de Miguel Primo de Rivera. Pujulà ne decidis ekziliĝi denove kiam alproksimiĝis la diktaturo de Franco ĉar eble li pensis, ke ĝi daŭros kvar tagojn kaj ĝi daŭris kvardek jarojn... Li estis malliberigita pro sia katalunisma kaj respublikana agado kaj mort-kondamnita. La verdikto estis komutita al dudek jaroj kaj unu tago da prizono, sed pro sia maljuneco, li estis liberigita en 1946, tamen malpermesita labori kiel ĵurnalisto kaj advokato.

Pujulà, prezidanto de la 5a Universala Kongreso de Esperanto, 1909, kaj iniciatinto de la Internaciaj Floraj Ludoj kiuj okazis dum la kongreso, vivis la lastajn jarojn de sia vivo decidite registri siajn memorojn skribe, kiel kontribuon al la historio de la lando kaj kiel patriotan devon; li obs-

tinis konservi la memoron de epoko kaj ties popolo. La malkovro temas pri rakontoj de lia infanaĝo ĝis lia lasta hejmo en Barjamon, garditaj de lia filo Feddy kaj memoraĵoj, plejparte verkitaj inter 1959 kaj 1960, senditaj per leteroj, ĉefe al Delfi Dalmau i Gener inter 1958 kaj 1962. Li pasigis la lastajn jarojn de sia vivo kiel anonima tradukisto, senigante sin, por pluvivi, de la pli multo el la pentraĵoj de sia kolekto kaj per la helpo de amikoj. La 30an de junio 1959, pro financaj kialoj, li kaj lia dua edzino, forlasis Palamós (Katalunio) por loĝi en Villebon sur Yvette, proksime de Parizo kaj de ilia filo, kaj poste en Barjamon (Okcitanio), kie li mortis la 14an de februaro 1963. Krom en Vikipedio, la biografio de Pujulà legeblas ankaŭ en la libro *Historio de Esperanto en la Kataluna Landaro* en la rubriko “Biografiaj Studoj, I”: F. Poblet. *Frederic Pujulà i Vallès, verkisto, katalunisto kaj esperantisto.*

La aŭtorino de la libro, *Frederic Pujulà i Vallès. Recordances a cavall de dos segles* (memoroj ponte inter du jarcentoj), kiun mi recenzas, konkludas: “Eldoni la memorojn kaj anekdotojn de Frederic Pujulà i Vallès estis por

ni neevitebla tasko, ago de justeco preskaŭ sesdek jarojn post lia forpaso, por konigi tiun ĉi verkiston, fidelan al liaj idealoj kaj do persekutatan; ni ne forgesu, ke li estis intelektulo kun firmaj respublikaj, katalunismaj kaj maldekstraj idealoj, kiu estis viktimo de faŝisma subpremo kiu volis lin silentigi. Lia plumo ribelis, kaj tiel, ĝis la lastaj tagoj, li neniam ĉesis skribi kaj havis la internan esperon, ke venos la tago, kiam iu montros ĉi tiujn tekstojn al la mondo, kion ni feliĉas plenumi per la nuna volumo”. Laŭ doktoro Josep Murgades, prezidanto de la tribunalo juĝinta la sezon de la aŭtorino, “temas pri tiu speco de literaturo, kiun ĉiuj faras sen intenco, senkonscie kaj ke en la kazo de Pujulà oni povus rekonstrui tutan mozaikon de senrilataj situacioj sed ĉiam kun kritika gvidlinio. Temas pri simpla ĝenro, specifa el la parolado, fiksita skribe kaj, jen la tubero en la afero, ke post la jaroj, filologo ilin elfosis por doni al ni materialon prenitan el la propra vivo de mondo antaŭ pli ol cent jaroj”.

En la retejo de Kataluna Esperanto-Asocio estas publikigita pli kompleta artikolo. ■

ANTAŬ 100 JAROJ

# CONGRÉS D'ESPERANTISTES IBÈRICS

**Xavier Margais Basi**

Historiador

**A**ls Països Catalans i part d'Espanya i Portugal hi havia un estat d'opinió favorable a la unió política de les distintes nacionalitats de la Península Ibèrica. Aquesta doctrina s'anomena *iberisme* i va ser avalada per polítics com Enric Prat de la Riba, poetes com Joan Maragall, militars com el general Prim, creadors de llenguatges artificials com Sinibald de Mas i també revolucionaris com els pertanyents a la Federació Anarquista Ibèrica o a les Joventuts Llibertàries. Es tractava també d'un corrent d'opinió que els esperantistes no podien obviar.

En aquest context i dins del marc esperantista, el 1920 a Barcelona i el 1921 a Saragossa es van celebrar encontres per tal d'organitzar políticament i jurídicament un instrument associatiu que permetés aquesta unió. Hi van participar federacions i entitats diverses, totes pertanyents a l'Estat espanyol però cap de Portugal, tot i que es pretenia que l'associació fos ibèrica. No obstant això, l'any 1923 es va celebrar a València el primer congrés d'esperantistes ibèrics, en el marc del tercer congrés espanyol d'esperanto i va comptar amb

l'adhesió per correu d'uns esperantistes portuguesos.

En aquell congrés es va definir l'espai territorial de cadascuna de les federacions i, conscients de la importància d'aquell encontre, alguns esperantistes mallorquins hi van prendre part, entre ells Narcís Bofill, Joan Barceló i Miquel Ribas de Pina. La importància de l'esdeveniment es feu visible dins del medi esperantista i també dins el món progressista mallorquí. Així, Guillem Forteza, batlle de Palma, s'hi va adherir especialment i va enviar una salutació als participants a l'esdeveniment. Per la seva banda, Narcís Bofill feu algunes aportacions concretes a la redacció dels estatuts. Una d'elles fou la proposta que les entitats esperantistes de les Illes passessin a formar part de la Federació Catalana d'Esperantistes. El text, amb la divisió territorial de l'espai ibèric per a les distintes federacions, fou aprovat en aquella assemblea i, efectivament, la zona balear quedà adscrita dins el territori de la Federació Catalana d'Esperantistes. Quedava encara per acabar de concretar bona part dels estatuts pels quals s'havia de regir aquella associ-

ció. Després de múltiples discussions, la conclusió a què s'arribà en el Congrés, fou la d'elaborar un projecte d'estatut, amb un article únic, que deia que la futura confederació havia de consistir en una unió de federacions les quals havien de tenir plena llibertat dins el seu propi territori i que la llengua de relació de les distintes federacions en les relacions internes havia de ser l'esperanto.

Fou molt important la complicitat entre l'esperantisme mallorquí i el català. Per això l'any 1924, durant l'11è Congrés de la Federació Catalana d'Esperantistes (KEF) a Vic, va sorgir la proposta de celebrar el següent congrés a Palma. I així fou com l'any 1925 es va celebrar el 12è congrés a la capital mallorquina i posteriorment es va celebrar el 14è congrés ja en l'any 1927, a Sóller. Tot plegat va succeir durant la Dictadura del general Primo de Rivera, entre els anys 1923 i 1930, una època amb situacions molt difícils de superar per part dels dirigents de KEF, i que van comportar càstigs amb oneroses multes i el tancament de *Kataluna Esperantisto* i de KEF. ■

# MEMORO PRI MARIA GARCÉS I COLL

**M<sup>a</sup> Àngels del Pozo Serrano**

Membro de KEA

**M**aria Garcés i Coll naskiĝis en Barcelono la 31an de julio 1935.

Ŝi naskiĝis ĉe la strato Ataülf, gotika kvartalo, en burĝa familio. Ŝi estis la plej aĝa el kvin fratoj kaj malgraŭ la milito kaj la post-milita periodo ŝi asertis, ke neniam estis financaj problemoj ĉe ŝi. Ŝi lernis sekretarian laboron kaj eklaboris en teksta firmao. Tiel ŝi renkontis la viron, kiu ŝanĝis ŝian vivon: Petro Nuez. La rilato ŝajnis kondamnita ekde la komenco, sed la grandega amo, kiun ili ambaŭ sentis reciproke, venkis la obstaklojn. La familio de Maria neniam akceptis Petron. Li estis simpla librotenisto. Krome li amis Esperanton, lingvon ligitan al la anarkiistoj dum la familio de Maria estis religiema. Sed tio ne estis problemo, Petro estis ŝia sola amo.

La teama paro instruis Esperanton en diversaj kluboj en Katalunio kaj helpis multajn homojn disvastigi la movadon. Mi pensas, ke ekzistis neniu klubo, kiu ne ricevis iliajn vizitojn. Ili vizitis kongresojn, ankaŭ eksterlande. Ili ambaŭ helpis fondi KEAn

kiel daŭrigan asocion de KEF kaj la entuziasmo de ambaŭ estis tiel forta, ke mi ne povas imagi la movadon sen ili. Bedaŭrinde, Maria ne estis bona oratoro. Petro rolis kiel oratoro ĉiam. Maria pacience korektadis la lecionojn de la metodoj plurfoje renovigitaj. Ŝi neniam laciĝis. Mi konsideras, ke Maria estis tre bona instruisto, ofte ne sufiĉe rekonata.

Kiam la amrilato kun Petro solidiĝis, ili ambaŭ decidis lui loĝejon por kunvivi. Iun tagon ŝi informis, ke ŝi finfine trovis taŭgan apartamenton sed, per privata denunco, la posedanto eksciis, ke ili ne estas leĝa paro. La faŝisma reĝimo akceptis nur katolike edziĝintajn parojn. La plej lamentinda afero estas, ke la denunco estis farita de esperantisto. Fine, Petro aĉetis apartamenton, proksime de la presejo kiun tiam ili ambaŭ estris, kaj la problemo finiĝis.

La presejo nomiĝis Gràfiques El Tinell, ĉe la strato Freneria, apud la placo Sant Jaume. Verŝajne la familio de Petro rilatis al metio, sed la presejo ne estis ordinara. Ĝi estis dediĉita al malnovaj ksilografiaĵoj. Maria de-

segnis ilin, pacience kaj persiste kiel la virino kia ŝi estis; ŝi aperigis mirindaĵojn. Post ilia emeritiĝo, la presejo iĝis vendejo por turistoj.

La loĝejo, zorge de Maria, baldaŭ fariĝis alloga kaj esperantista hejmo. Ĝi estis plena de Esperantolibroj kaj senpage vizitata, allogis samideanojn el la tuta mondo. Maria konservis ĝin kiam Petro mortis, sed ŝi ekloĝis kun sia denaska familio.

Post iom da tempo, denove la fiulo kiu denunciis ilian malpermesitan situacion trompis ŝin. Maria malkovris ke en ŝia apartamento loĝas aŭstralianoj kiuj pagis luon al tiu fiulo. Kiam la aŭstralianoj foriris ŝi vendis la loĝejon.

Ŝi estis vicprezidantino de KEA de 1988 ĝis 1994. Lastatempe ŝi estis grave mense malsana. Iom post iom ŝi sentis sin soleca. Ŝi ne parolis lastatempe, sed ŝia frato regule informis min pri ŝia situacio. Fine, agonio kaj malsano venkis ŝin la okan de februaro ĉi-jare, 2023. Maria ĉiam vivos en mia koro. ■

# LA DIADA ESPERANTISTA DE 2023, UNA CELEBRACIÓ DOBLE: DOS DIES A DOS INDRETS DIFERENTS

**Alfons Tur**

Membre de KEA i denaska esperantisto



La doctora en Filologia Catalana Imma Farrés va presentar el llibre sobre el pioner esperantista Frederic Pujulà i Vallès, Recordances a cavall entre dos segles.

**D**ivendres 16 a Barcelona i disabte 17 de desembre a Subirats (Alt Penedès) l'Associació Catalana d'Esperanto va celebrar el Dia de Zamenhof, dedicat a recordar la figura de Ludvik Lejzer Zamenhof, iniciador de la Llengua Internacional Esperanto, com a ell li agradava anomenar-se. Els actes de celebració van tenir a veure amb les novetats de l'editorial de l'Associació, els canvis en la revista i el projecte de l'Espai Esperanto que està duent a terme l'Ajuntament de Subirats amb una part del llegat del Museu d'Esperanto que va existir durant anys, mercès

a la dedicació del nostre estimat Lluís Hernández-Yzal i la seva família.

Divendres a la tarda en un acte celebrat a l'Espai Vilaweb de Barcelona va tenir lloc la presentació de dos nous llibres editats per l'Associació apareguts dins de les col·leccions "Montserrat Franquesa i Gòdia" i "Jaume Grau Casas". A l'acte hi havia de participar Mita Casacuberta, historiadora olotina i directora de la càtedra Víctor Català, però malauradament per problemes familiars de darrera hora no vàrem poder compartir amb la seva presència.

Malgrat aquesta absència imprevista, l'acte el va presentar en Carles Vela, historiador i responsable de l'editorial de la nostra associació, que ens va fer una introducció sobre el tema i ens va presentar el llibre *Antologia de Solitud i altres relats/ Antologio de Soleco kaj aliaj rakontoj*, un volum de la col·lecció Jaume Grau Casas, que recull una selecció de fragments de *Solitud* i tres contes de Víctor Català, pseudònim literari de Caterina Albert i Paradís. Cal remarcar que entre l'audiència hi havia els hereus d'En Josep Ventura I Freixes, traductor a l'esperanto de *Solitud*, que es van



mostrar molt agraïts pel reconeixement del seu avi i la recuperació de la seva feina.

En el mateix acte vàrem tenir la presentació del llibre *Forte Verki / Escriure amb força*, primer volum aparegut a la col·lecció Montserrat Franquesa i Gòdia que presenta, en esperanto i català, una selecció d'obres poètiques creades per poetesses en esperanto que van resultar premiades als Jocs Florals Internacionals convocats per la Federació Esperantista Catalana.

Elisabet Abeyà i Xavier Margais, coautors de la selecció de les obres, ens van presentar el llibre i llur tasca de recerca, tot destacant l'objectiu de donar a conèixer un conjunt d'autores que havien estat injustament invisibilitzades en els reculls d'obres premiades als Jocs Florals.

Fent un salt (breu) en el temps i l'espai passariem a la segona part de la diada que va tenir lloc a Sant Pau d'Ordal (Subirats) on es va presentar un altre llibre, en aquest cas sobre el pioner Frederic Pujulà i Vallès, i el projecte en curs de l'Espai Esperanto que està duent a terme l'Ajuntament de Subirats.

Al matí del dissabte 17 de desembre, a la sala polivalent del Centre Agrícola de Subirats a Sant Pau d'Ordal, es va presentar el projecte del nou Espai Esperanto, un projecte únic i ambiciós que tindrà la seva seu en un edifici annex a l'actual Ajuntament, i que ja està en construcció en aquesta vila de l'Alt Penedès. El regidor de cultura, Francesc Perea, va desgranar les línies mestres del projecte, que no només preveu construir un espai que aplegui els fons de l'antic Museu d'Esperanto de Subirats, sinó també un centre d'interpretació de la tradició esperantista del municipi, on s'hi exposaran materials diversos relacionats amb l'Esperanto, així com un audiovisual sobre el qual ja s'està treballant. D'altra banda se'ns va explicar la ruta cultural projectada a Sant Pau d'Ordal com a complement de l'Espai Esperanto.



*Divendres a la tarda en un acte celebrat a l'Espai Vilaweb de Barcelona va tenir lloc la presentació de dos nous llibres editats per l'Associació apareguts dins de les col·leccions "Montserrat Franquesa i Gòdia" i "Jaume Grau Casas".*

En aquest mateix acte, la doctora en Filologia Catalana Imma Farrés va presentar el llibre sobre el pioner esperantista Frederic Pujulà i Vallès, *Recordances a cavall entre dos segles*, una extensa obra que recull textos autobiogràfics i correspondència de Frederic Pujulà, un dels autors més desconeguts del Modernisme català, amic d'artistes com Picasso o Víctor Català, considerat el primer autor d'una novella de ciència ficció en català, *Homes sintètics*. D'altra banda, va ser un dels pioners de l'esperanto a Catalunya, autor de diverses gramàtiques i vocabularis, i president del 5è Congrés Universal d'Esperanto, celebrat a Barcelona l'any 1909.

L'autora ens va fer una extensa presentació del llibre, i ens va delectar llegint-nos-en alguns fragments que ens varen permetre copsar una part de la personalitat polièdrica d'en Pujulà i ens en va fer conèixer molts fets i aspectes que ens eren desconeguts.

Com a cloenda de l'acte i les celebracions de la diada esperantista d'enguany vàrem tenir una senzilla

cerimònia de traspàs de la redacció de Kataluna Esperantisto, la revista oficial de l'Associació: d'Elisabet Abeyà i Xavier Margais, que s'havien fet càrrec de la redacció a causa de la sobtada pèrdua de la Montserrat Franquesa, a Pere Fornells, que en prendrà el relleu. En aquest acte es va tenir un record sentit per a Montserrat Franquesa, editora de la revista, que va morir tot just assumir aquesta responsabilitat i haver-ne publicat el primer número de la nova època. Així mateix durant l'acte el president de KEA, N'Òscar Puig va destacar que, malgrat el canvi evident de la línia editorial empresa per la Montserrat, recollida per Xavier Alcalde, Bet Abeyà, Xavier Margais i que ara entoma Pere Fornells, no hi ha un trencament, sinó una evolució del projecte, i va fer èmfasi en el fet que totes les persones que ja havien col·laborat a la revista en l'etapa anterior hi segueixen contribuint d'una o altra manera.

En acabar, una part dels assistents van dinar plegats en un tradicional àpat de germanor en un restaurant de la localitat. ■

# ZAMENHOFA TAGO 2022 A GRÀCIA

**Xavier Alcalde**  
Polítologo



**G**iuseppe (Pino) Pinelli nasqué a Milà en una família de classe treballadora. Aviat deixà l'escola i entrà al mercat laboral, tot i que continuà formant-se de forma autodidacta. Encara adolescent, participà en la lluita partisana contra el feixisme. En aquest context es feu anarquista, un compromís que mantindria durant tota la vida. Fundà grups, col·laborà en revistes, fou responsable de biblioteques, recolzà iniciatives sindicals, fou naturista.... El 1968 assistí al congrés anarquista internacional de Carrara, que tenia com a objectiu unir els vells activistes dels anys vint i trenta amb els joves que formaven els nous moviments socials i culturals, i que anhelaven una societat més lliure. Tanmateix, la guerra freda dificultava l'activitat política de l'esquerra italiana i la lluita de classes es mostrava en tota la seva cruesa. Era una època de vagues,

ocupacions de fàbriques, assassinats de les Brigades Roges... Mentrestant, els neofeixistes feien explotar bombes per les quals sovint eren arrestats anarquistes. Es tractava de crear artificialment una situació de caos que justificqués la repressió per part del govern. D'altra banda, en Pino era molt actiu en diverses xarxes de solidaritat amb els oprimits i amb els companys empresonats, incloent-hi els presos polítics del franquisme.

Entusiasta i carinyós, altruista i una mica ingenu, així el recorda la seva parella, Licia. Es van conèixer amb 24 anys en un curs d'esperanto. Immediatament es reconegueren en l'aspiració als ideals de fraternitat humana, revolució no violenta i un món sense fronteres. I això els feu enamorar-se. En Pino era feliç quan els seus corresponsals esperantistes

visitaven Milà. Profundament pacifistes, Licia i Pino creien que l'esperanto contribuiria a un món més just. En la seva última carta, en Pino explicava a un company pres que "L'anarquia no és violència. Nosaltres ens neguem a fer servir la violència, però tampoc la volem patir". Tot i que era ateu, tenia molt bona relació amb els catòlics objectors de consciència.

El 12 de desembre de 1969 tingué lloc un atemptat a la plaça Fontana que esdevindria un punt d'inflexió en la història política del país. Avui sabem que aquella massacre (17 morts i 88 ferits) fou obra de l'extrema dreta, en col·laboració amb els serveis secrets italians i nord-americans. Tanmateix, en Pino en fou considerat responsable, perquè això encaixava amb la narrativa oficial de la violència anarquista. Segons la policia, el dia de la Zamenhofa Tago el ferroviari llibertari es suïcidà en una comissaria, admetent així la seva culpa. El traspàs de Giuseppe Pinelli fou immortalitzat pel premi Nobel Dario Fo a *Mort accidental d'un anarquista*.

El 15 de desembre de 2022 el grup d'esperanto de l'ateneu llibertari de Gràcia organitzà la projecció del documental *Pino. Vida accidental d'un anarquista* (2020), doblat en la llengua internacional, i que mostra la perspectiva íntima de les filles Claudia i Silvia sobre aquests fets. Una vintena de persones van participar en l'acte, que tingué lloc a l'ateneu independentista La Torna, també a la vila de Gràcia. ■

# SABADELL, SEU DE LA 10A EDICIÓ DELS *KER-EKZAMENOJ*

**Maria Sánchez Montes**

Politika sciencistino kaj sekretariino de KEA



SEBASTIÀ RIBES

**E**l passat 26 de novembre va tenir lloc al CES una nova edició dels *KER* ekzamenoj on es van examinar 12 persones (1 del nivell B1, 4 del nivell B2, 5 del nivell C1 i 2 del nivell C2).

Que són els *KER-ekzamenoj*?

Des de desembre del 2008, la UEA gestiona un sistema d'exàmens internacionals d'esperanto, que compleix els requisits del Consell d'Europa i defineix els estàndards lingüístics.

Aquests exàmens monolingües s'han desenvolupat segons el Marc europeu comú de referència (CER) per als nivells B1, B2 i C1, i des de l'any 2021,

per al C2. El reconeixement i funcionament del sistema es va dur a terme en col·laboració amb el Centre Estatal d'Examen d'Idiomes (ORIGO) a Budapest, on l'esperanto es troba entre les llengües estrangeres reconegudes per l'estat i, com a part del seu sistema d'exàmens, té els mateixos drets que qualsevol altra llengua estrangera.

El fet que aquests exàmens s'hagin construït a partir dels estàndards europeus fa que el seu certificat estigui reconegut oficialment i es tracti com els altres certificats d'examen d'idiomes.

Fins al mes de desembre del 2022, hi ha hagut més de 80 sessions a 32

països amb un total de 2.650 persones que han aprovat. Els participants provenen de 81 països.

Per a l'any 2023, *KER-EC* està planificant exàmens en línia dels nivells B1, B2 i C1 al mes de juny i un examen presencial durant la UK a Torí per a tots els nivells.

Podeu trobar més informació a la següent pàgina web: <https://edukado.net/ekzamenoj/ker> i no deixeu de consultar la secció d'articles de KEJ, si voleu assabentar-vos d'una anècdota relacionada amb l'edició d'enguany dels *KER-ekzamenoj* a Sabadell. ■



# ESPERANTO, PLURLINGVISMO KAJ SOCIAJ MOVADOJ EN LA LONGA 20A JARCENTO

**Lluís de Gibert**

Zoologo kaj vikipediisto



La aranĝo “Esperanto, plurlingvismo kaj sociaj movadoj en la longa 20a jarcento” okazis la 2an de marto en la Instituto de Katalunaj Studoj kaj en la stratoj de la kvartalo Gracio. La programo temis pri la analizo de la rolo de Esperanto rilate al la lingva justeco kaj sociopolitikaj luktoj dum la 20a jarcento kaj pri la estontaj perspektivoj por la esperantistaro. Per kelkaj akademias kaj praktikaj agadoj la partoprenantoj havis la bonŝancon lerni kaj cerbumi pri la tiel nomata Internacia Lingvo kaj pri ĝia efiko en la mondo. La renkontiĝon, krom esperantistoj, partoprenis ankaŭ homoj novaj en la

esperantistaro aŭ kun malmulte da antaŭscio de Esperanto, kio aldonis riĉigan dimension al la sperto por ĉiuj ĉeestantoj.

Indas diri, ke la historia kunteksto, en kiu Esperanto disvolviĝis estis tumulta, plene markita de konfliktoj kaj militoj. Malgraŭ tio, la nova lingvo trovis fekundan grundon en Katalunio, kie ĝi forte enradikiĝis, ligita al la katalunisma kaj laborista movadoj. En internacia nivelo, Esperanto naskiĝis en tempo de lingva batalo, kiam neniu ekzistanta lingvo povis ludi la rolon de lingvafrankao. Komence regis la franca,

sed post la Malvarma Milito la angla akiris nediskuteblan superecon.

La aranĝo komenciĝis per du prelegoj kaj ronda tablo, kiuj okazis en la Instituto de Katalunaj Studoj. Roberto Garvía, el la Universitato Carlos III, parolis pri la fruaj jaroj de la esperantista movado en Katalunio, emfazante la momentojn de konflikto kaj kunlaboro inter la diversaj fluoj de la esperantismo, kaj Guilherme Fians, el la Universitato de Saint Andrews, pritraktis la rolon de Esperanto en la neŭtralaj amaskomunikiloj dum la Malvarma Milito kaj la postkoloniaj aferoj rilataj al tiu ĉi lukto.



Post la kafopaŭzo okazis ronda tablo kun partopreno de Monica Heller, Maria Rosa Garrido, Nicolau Dols, Xavier Alcalde, Guilherme Fians kaj Roberto Garvía. La diskuto temis pri pripensoj kaj perspektivoj pri Esperanto en la 20a jarcento. Dum la debato oni emfazis la transversecon de la esperantistaro, en kiu oni trovas grandan diversecon de ideoj, opinioj kaj aliĝoj, kiuj preterpasas la lingvon. Malgraŭ tio, ke Esperanto havas ideologian bazon de paco kaj lingva justeco, ekzistas membroj, kiuj venas el malsamaj politikaj ideologioj, sociaj movadoj aŭ religioj. Tio signifas, ke ligoj kaj diskutoj povas esti establitaj inter homoj, kiuj, en aliaj cirkonstancoj, povus stari unu kontraŭ la alia. Tiusence, Esperanto povas esti spaco por renkontiĝo kaj dialogo inter homoj kun malsamaj vidpunktoj.

La dua parto de la tago okazis posttagmeze, en la stratoj de Gràcia, kun la aktivado “Esperanto-vojo tra la urbo Gràcia”, gvidata de Xavier Alcalde. Per la nomenklaturado de la stratoj oni vizitis diversajn signifajn lokojn ligatajn al Esperanto, kiel la sidejo de asocioj kiel Paco kaj Amo kaj eldonaĵoj kiel la Informa Bulteno de la CNT-AIT-FAI kaj lokoj rilataj al ĉefaj gravuloj de la esperantismo kiel Ramón Fernández Jurado aŭ Domènec Massachs.

La konferenco estis organizita de la Filologia Sekcio de la Instituto de Katalunaj Studoj kaj la Aŭtonoma Universitato de Barcelono per la Esplorgrupo pri Interkultura Komunikado kaj Intertraktaj Strategioj- (CIEN), la Esplorgrupo pri Angla Lingvistiko (GReLA) kaj la fako pri Angla Filologio kaj Germanaj Studoj. Substrekindas la partopreno de Monica Heller, profesoro de la Universitato de Toronto specialigita pri sociolingvistiko kaj lingva antropologio, kiu la 28an de februaro ricevis honordoktorecon de la Aŭtonoma Universitato de Barcelono. ■

## KATALUNA ESPERANTO-JUNULARO RAVAS: LA RENKEJTIĜO, SUKCESA ARANĜO EN KATALUNIO

David Ruíz Sánchez

Artikolo aperinta en *La Ondo de Esperanto* 2023:01 (315)



*Jen la komuna foto de La RenKEJtiĝo!*

**L**a semajnfino inter la 24a ĝis la 26a de februaro okazis, danke al la membroj de la Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ), sukcesa junulara Esperanto-renkontiĝo en Manresa, Katalunio, nomata La RenKEJtiĝo!

Ni havis ĉirkaŭ sesdek aliĝintojn de preskaŭ dudek naciecoj, venintaj el ŝtatoj de la tuta kontinento kiel Ĉeĥio, Italio, Hispanio kaj Belgio, interalie, rekte al la koro de Katalunio. Pere de la valora internacieca profilo de nia aliĝintaro, ni povis proponi la senton de frateco kaj amikeco el la esperantaj valoroj en junula etoso.

La aranĝo estis organizita kadre de la Fira de l’Aixada, grava kermeso en la regiono — kies ĉefurbo Manresa estas — kun mezepoka temo kaj festa etoso, pri kiu la partoprenintoj de la RenKEJtiĝo povis kaj ĝui kaj esti engaĝitaj en la tradicioj kaj la kutimoj de la kataluna popolo.

La partoprenintoj ekalvenis vendrede la 24an posttagmeze, tagon en kiu ni proponis unuan kontakton kun la urbo ekskursante al la Turo de Santa Caterina. Tie ni ĝuis la vidindajn vesperajn panoramojn de la tuta teks-industria urbo kaj de la sankta monto de Montserrat, la plej grava monto



por katalunoj, kiu staras ĝuste en la centro de la lando. Ni finis la tagon per interkonaj ludoj, vespermanĝante kaj gustumante lokajn vinojn kun la deven-nomo Pla de Bages.

Sabate la 25an ni faris interesan viziton gviditan al la Muzeo pri Akvo kaj Tekstilo. Ni konatiĝis kun la historio kaj la grava rolo de la teksa industrio en la urbo. Post la matena ekskurso, alvenis la tagmanĝohoro! Ni moviĝis al publika krad-rostejo por frandi gravegan parton de la kataluna gastronomio... *La calçotada!* Temas pri rostado de viandaĵoj, legomoj kaj junaj cepe-toj kiujn oni trempas en saŭcon Romesco. Tio estas tre tipa okazaĵo inter katalunaj junuloj por pasigi tagmezon manĝante kaj trinkante inter amikoj.

Post la fino de la *calçotada* ni revenis al nia gastejo, kie eblis ripozi post longa kaj ĝuita manĝumado sed... ni proponis ankaŭ kurseton pri la kataluna lingvo, realigon de sciencaj eksperimentoj rilate al la akvo kaj Esperanto-kursojn kaj por komencantoj kaj progresantoj!

Kompreneble je la alveno de la vespermanĝo, kiel en la tipaj Esperanto-aranĝoj junular-etosaj, ni okazigis Trinkomanĝan Nokton! Ĉiu homo el malsama lando kunportis kun si manĝaĵojn, drinkaĵojn kaj dolĉaĵojn de sia lando por amike kundividi kaj festi june kaj internacie.

Dimanĉon la 26an bedaŭrinde estis nia lasta kuna tago. Antaŭ ol ĝisi ni ekskursis por viziti aliajn vidindaĵojn de la urbo kaj ĝui aktive la mezepokan kermeson de la urbo.

Ni ekigis nian ekskurson vizitante la Seu de Manresa, imponan gotikan bazilikon, kiu estas la ĉefkonstruaĵo de la urbo. Apud ĝi troviĝas grava vizitindaĵo kiun ni ankaŭ trarigardis, tio estas la Groto de Sanka Ignaco. Tie la fama jezuito Ignaco de Lojola restis dum preskaŭ unu jaro dum li skribis sian ĉefverkon, la *Spiritajn ekzercojn*. Post tio, ni oficiale kaj kortuŝe adiaŭis unu la alian kaj proponis libere ĝui la etoson kaj la manĝaĵojn de la kermeso.

La organiza kongresteamo —konsistinta el Jordi Calafi, Lucía Montserrat Fernández, Òscar Hernández, Pol Jiménez, Siru Laine, David Ruíz kaj Krishna Sivillà— sentas fervoran plezuron ricevi tiom da bonaj komentoj pri ĝi. Multaj interesiĝis pri la unua ĉeesta aranĝo de Kataluna Esperanto-Junularo realigita en jaroj. Ni pritaksas la rezulton de tiu ĉi sperto tre fruktodona kaj por la loka kaj por la internacia Esperanto-junulara movado. Ni sendube ripetos la aranĝon! Ĝis baldaŭ! ■

## RELLEU A LA PRESIDÈNCIA DE KEJ

**Antoni Gimeno Cortés**

Expresident de KEJ

### LA RE-RENASKIĜO DE KEJ

Balanç de l'Associació durant l'època de la meva presidència (maig 2019 – setembre 2022)

**A**quell dimarts de començaments del 2019, com qualsevol altre, em disposava a anar caminant cap a les “Babiladoj” al Bar del CAT del Tradicionàrius, al barri de Gràcia. Res no feia pensar que aquell dimarts no seria un dimarts més, si no fos perquè va ser la tarda que vam plantar la nova llavor de KEJ. Una tarda en què, entre bromes, va sorgir la idea de fer re-renéixer KEJ. Va ser llavors que la Maria S., en David R. i un servidor vam decidir tirar pel dret i començar aquesta nova aventura a cegues.

Durant els següents mesos vam tenir una feinada de por recercant documents d'èpoques passades, anant al departament de Justícia de la Generalitat de Catalunya, demanant altres documents de l'Associació, creant les nostres noves xarxes socials i fent els primers passos per uns nous estatuts més moderns. Tampoc m'oblido d'agrair l'ajuda d'en Samuel N. i d'en Michael B. per haver estat els nostres primers contactes amb TEJO.

Durant tot aquest temps en què reestructuràvem l'associació per dins i es

feien feines internes vam decidir que seria bo fer quelcom de cara a l'associat (i no associat), i més o menys regularment vam anar organitzant les “Bierumadoj” i vespres de “Tabulludadoj”. Havien de tornar a fer pinya.

Sense ni adonar-nos-en el temps va passar volant, i en un tres i no res ens vam plantar al 2020, però sense poder-nos imaginar què ens depa- rava aquell fatídic març: **COVID**, la paraula màgica que va parar el món i la nostra Associació, si més no de ma- nera presencial. Va ser llavors quan vam organitzar les “interkultura- j virtualaĵoj” i les “RET-Bierumadoj”: Gràcies a aquestes trobades virtuals vam guanyar molta visibilitat fora de les nostres fronteres. Va ser el nai-

xement real de la nova KEJ fora dels PPCC. D'altres esdeveniments com “la RenKEJtiĝo”, malauradament, van haver d'esperar.

A poc a poc les noves juntes van anar creixent i rejuvenint-se. Vam tenir les millors incorporacions que KEJ podia tenir amb l'entrada d'en Chus G. en Jordi C. i n'Òscar H. Gràcies a ells i a la feina feta per les juntes anteriors, començàvem a veure'n fruits. El número de socis pujava, les nostres xarxes socials cada cop tenien més seguidors, vam ser visibles a universitats públiques del país. I es que vam passar de 17 socis amb una mitjana d'edat de gairebé 28 anys a vora uns 30 socis amb una mitjana d'edat de 25.

En aquestes circumstàncies vaig creure convenient “fer un pas al costat” i deixar pas a les noves genera- cions que venien trepitjant fort amb idees noves i fresques. Realment crec que un grup de jovent de vora els 20 anys pot aportar molt més que un ser- vidor amb 30 i escaig.

Passats els mesos des de que vaig decidir marxar com a president i veient la feina que la nova junta ha aportat i aportarà a KEJ puc dir ben orgullós que he deixat l'Associació en les mil- lora mans que podia, tant pels que van seguir com per les noves incorpo- racions.

VIVU KEJ ■



## PREZENTA SALUTO

**Jordi Calafí Franquesa**

Prezidanto de KEJ

**S**aluton! Mia nomo estas Jordi kaj en la pasinta oktobro mi estis elektita Prezidanto de Kataluna Esperanto-Junularo. Okupi ĉi tiun rolon estas persona defio: Nia asocio estas en momento de kresko kaj mi pensas, ke oni devus maksimume profiti tion. Mi aliĝis al KEJ en 2021 kun granda deziro kunlabori kaj ekde tiam mi partoprenis en multnombraj aranĝoj de la asocio. La sekvan jaron mi iĝis ano de la estraro (estinte la plej juna membro), kie oni okazigis multajn agadojn profitante ke la pandemio finiĝas. KEJ komencis organizi ekskursojn, fizikajn bierumadojn... Kaj gravajn aranĝojn kiel la Esperanto-Kurson en Universitato Pompeu Fabra. Tiu ĉi kurso estis sukceso, kiu kontribuis allogi novajn membrojn al la asocio kaj disvastigi Esperanton almenaŭ ĉe mia universi- tato. Tio kaŭzis, ke KEJ organizis pli da kursoj: dum la Kongreso de Castelldefels, ĉe RenKEJtiĝo en Manresa kaj fine ĉe la Universitato de Barcelono (kondukitaj de nia fremdulo Òscar

Hernández). Disvastigi Esperanton estas unu el la ĉefaj celoj, kaj ŝajnas, ke ni sukcesas. Dum mia mandato ni klopodis ĉiam plifortigi ligojn kun di- versaj junularaj esperantistaj organi- zaĵoj: estraranoj partoprenis en kun- venoj kaj kongresoj en Italio, Neder- lando, Germanio, Francio, Pollando... Kaj tio utilis por konigi nin kaj ke al- menaŭ la eŭropaj asocioj vidu nin kiel tre viglan kaj aktivan organizon. Du el miaj kolegoj en la estraro (Òscar kaj David) konstante laboras kun TEJO kaj ankaŭ tenas kontakton kun niaj kolegoj de EKC en Tuluzo. Organizati kunvenon kiel la RenKEJtiĝon estis granda persona atingo, povi montri ĉion kio estis farita lastatempe. Tie ni lernis mastrumi plurajn kaj diversajn rolojn kiel kasist-aferojn, administr- adon de aliĝoj, bakadon de *kalsotoj*... RenKEJtiĝo instruis al ni amason de aferoj kaj pruvo de tiu sukceso estas la alta internacia kaj junulara par- topreno. Persone mi restas engaĝita al Esperanto kaj uzos miajn kapablojn por grandigi kaj plivigliĝi KEJ. ■



# LASTA AGADO DE KEJ

## PARTICIPACIÓ DE KEJ A LA 30A KEKSO (KREEMA ESPERANTO-KURSO)

Jordi Calafi

**D**el 21 al 24 d'octubre del 2022, dos membres de KEJ van participar a la 30a edició de la trobada de joves esperantistes alemanys, organitzada aquest cop en col·laboració de la Deutsche Esperanto Jugend (GEJ) amb la Junulara Esperanta Franca Organizo (JEFO). Aquesta va tenir lloc a Kirkel, a la regió fronterera del Sarre, Alemanya.

L'edició de l'octubre tenia per tema 'Mastrumado de sociaj retoj', i es va fer una formació sobre l'ús professional de les xarxes socials i un curs d'idiomes. Tots dos programes van comptar amb la participació de membres del KEJ, en part gràcies als fons Erasmus+. El nostre exvocal de xarxes socials, Jordi, va dirigir la formació especialitzada en gestió de xarxes socials en col·laboració amb Ana Ribeiro, programadora de Facebook (Grup Meta). Estem molt contents que KEJ sigui un referent per a la gestió de llocs web a la comunitat esperantista. L'oferta que se'ns va fer a KEJ per fer una formació sobre xarxes socials és una demostració de la bona situació en què es troba la seva gestió. Amb més de 1000 seguidors, la nostra pàgina d'instagram – per exemple – ha anat creixent a un ritme molt elevat (aproximadament un seguidor per dia de mitjana). La resta de xarxes socials també han estat recentment molt actives i segueixen guanyant seguidors (prop de 500 a Twitter). Aquesta és una bona forma de reivindicar l'esperanto i donar a conèixer l'idioma.

I a l'altre programa -el curs d'idiomes- hi va haver la participació de Lucía Fernández. Aquí es va poder gaudir de diverses (i entretingudes) activitats per millorar el nivell d'esperanto. El funcionament de KEKSO va servir per veure des de dins com funciona una trobada esperantista de mida petita-mitjana: des de com es gestionaven les excursions fins a com oferir menjar per a tanta gent. La participació de KEJ va suposar una grata experiència i una oportunitat – un cop més – per donar a conèixer la nostra associació a la resta de grups joves d'Europa i del món. ■

## ANEKDOTO EL LA 10A ELDONO DE LA KER EKZAMENOJ EN SABADELL

Maria Sánchez Montes



**N**e ekzistas eldono de la *KER-ekzamenoj* sen anekdotoj kaj ĉi tiu 10a ne estis escepto. La kopioj de la ekzamenoj estis senditaj de KER-EC per poŝto al la adreso de la respondeculo pri la organizado de tiuj, kiuj okazis en Sabadell kaj, vi ne kredos, ili estis ŝtelitaj el ŝia leterkesto! Tiu ĉi malsukceso ne haltigis nin kaj post preparo de novaj ekzamenaj kopioj de KER-EC, ili estis retroŝtitaj kaj presitaj antaŭ ol la granda tago okazis. ■

## PARTOPRENADO DE KEJ-ANOJ EN LA VINGUSTUMADO DE SUBIRATS

Lucía Montserrat  
Fernández Barrera

**L**a 27an de novembro du KEJ-anoj ĉeestis en la vingustumado ĉe la bela vilaĝo Subirats, kie estas konstruanta la "Espai Esperanto" kaj staras la Esperanto-Muzeo. La vingustumado komenciĝis per konferenco pri la tradicio liganta vinon kaj Esperanton, gvidata de Alfons Tur. Poste, reprezentanto de Maspujadó prezentis sian ŝaŭmvinon kaj ĉiuj partoprenantoj povis gustumi ĝin. Tiu ĉi agado estis ene de la programo de "Subirats Tasta'l", do ankaŭ la partoprenantoj povis promeni tra la vilaĝo kaj ĝui aliajn vinojn kaj manĝaĵojn.

La agado estis tre interesa, kaj, kvankam ne multaj homoj venis, ĝi montras ke Esperanto vivas kaj donas al ni la ŝancon malkovri novajn aferojn kaj lokojn (por mi tiu estis mia unua vizito al Subirats). Ni esperas, ke pli da iniciatoj kiel tiu ĉi okazos kaj ke ĉiufoje pli da homoj partoprenos ilin! ■

## E-KURSO EN LERNEJO DE RIPOLLET

Jordi Aguilar

**Ĉ**i-jare mi instruas eksterplanan enkondukon al Esperanto en la mezlernejo Lluís Companys en Ripollet. Komence, ok gelernantoj partoprenis la kurson, sed nur kvin daŭre lernas pro diversaj kialoj, precipe ĉar ili bezonas tempon por studi.

Ili estas tre scivolemaj lernantoj kaj trovis la esperantan gramatikon tre interesa. Ili eĉ amuziĝis serĉante falsajn amikojn inter la kataluna kaj Esperanto kaj tradukante kelkajn esperantajntajn kantojn al la kataluna.

La kurseto enhavas ludojn, kantojn kaj agadojn por faciligi la komunikadon inter la lernantoj, kombinitajn kun ekzercoj de baza kurso de lernu.net, kiuj enhavas sonregistrojn kaj dialogojn. ■

## AGADO DE KEJ-ANOJ EN TEJO

Òscar Hernández kaj David Ruíz

**N**i povas fiere diri, ke nuntempe, ekde la revekigo de KEJ en 2019, ni travivas tempon en kiu la engaĝigo de KEJ en TEJO kaj la rilato inter ambaŭ organizoj estas en la plej forta momento de iliaj historioj. Pruvas tion la granda kvanto da KEJ-anoj kiuj lastatempe partoprenis en internaciaj projektoj de TEJO (iru al la pasinta numero de *Kataluna Esperantisto* por legi pri tiaj spertoj), kaj ankaŭ la pluraj KEJ-anoj en la Estraro, Komitato kaj Komisionoj de TEJO, kiel Michael Boris, Manuela Burghlelea, Òscar Hernández kaj David Ruíz. Oni lastatempe ĉe TEJO sufiĉe ofte aŭdas aludojn al la aktiveco de KEJ, kaj eĉ la prezidanto de TEJO fariĝis pasiva KEJ-membro!

David Ruíz Sánchez rakontas pri sia sperto kiel estrarano de TEJO: “Ja oni konsideras nature enplektiĝi en la aktivaĵojn de inkluziva komunumo kiam la valoroj kiujn ĝi defendas tre pasias. Jen tio al mi okazis kun TEJO. Tiele, en septembro ekis mia estraraneco por la mandato 2022-2023. En la estrara teamo ni havas tre internacian etoson. Ni kunlaboras kaj retkunvenas ĉiun trian semajnon kun personoj el Argentino, Singapuro aŭ D. R. Kongo ekzemple por realigi niajn rezoluciojn. Ni ĉiuj havas niajn ĉefrespondecojn pri kiuj ni forte zorgas ke ili bone iras. Persone mi respondecas pri Aktivula Trejnado — la trejnistaro de TEJO — kaj pri Projektoj kaj Subvencioj. Verdire, resti en tiu ĉi posteno, sendepende de la postulata diligenteco kaj respondecemo, donas al mi multege da sperto kaj scioj en fakoj kiujn mi neniam antaŭe profunde konis, liveras anekdotojn tre memejajn (ekzemple kiam tre serioze oni demandis rekte al mi en estrarkunsido... kial KEJ ne kandidatiĝas por okazigi IJK-on en 2024?!) kaj enmovade oni havas la eblecon montri ke la junulara E-komunumo en Katalunio forte brilas.”

Òscar Hernández rakontas pri sia sperto kiel komitatano A en TEJO: “Antaŭ unu jaro, dum la Paska Semajno de 2022, mi partoprenis en projekto de TEJO pri Demokratio kadre de la Internacia Junulara Festivalo en Italio. Tio estis mia unua kontakto kun TEJO. Ekde tiam, mi interesiĝis pri la surprize kompleksa strukturo de TEJO kaj pri ĝia multflanka kaj bunta agado. Nun mi, kiel komitatano

A de TEJO, rolas kiel reprezentanto de KEJ en la Komitato de TEJO, kaj klopodas por interplekti kaj interkonigi la agadojn kaj membrojn de ambaŭ asocioj. Mi ankaŭ kun granda plezuro aktivas en la komisiono pri Scienco de TEJO, kio permesis al mi kunlabori kun tre interesaj homoj. Ne hezitu kontakti min se vi havas dubojn aŭ proponojn rilate al TEJO! ■

## PRI LA BIERUMADOJ DE KEJ

Xavier Rebled

**O**fte miaj geamikoj demandas al mi, kiam ili malkovras, ke mi lernas Esperanton, “kial paroli lingvon, kiun eblas paroli nur kun multaj homoj?” Tiu tre konata situacio por multaj (verŝajne por ĉiuj) geesperantistoj respondas al onia manko de sperto en Esperantujo. Miaj geamikoj ne kapablas kompreni, kiam mi asertas, ke Esperanto estas la tria lingvo, kiun mi plej ofte parolas, post la kataluna kaj la hispana. Tiam mi fieras rakonti al ili pri la Bierumadoj. Ĉi tiuj renkontiĝoj, kiuj okazas foje monate, permesas al junaj geesperantistoj babili en amikema etoso de trinkejo. Homoj el malsimilaj lingvaj niveloj, for de akademias rigoroj, parolas kune, ridas kune, eĉ filozofas kune, dum ili trinkas aŭ manĝas ion. Kelkfoje aperas eksterlandaj geesperantistoj, kiuj vizitas la urbon, kaj aliĝas al ni. Ĉiuj estas bonvenaj! Mi konsideras min sufiĉe timema, sed mi jam atendas la venontan Bierumadon! ■



# ANGULO POR ETERNAJ KOMENCANTOJ

Pedro M. Martín Burutxaga

Lingvemulo

**E**n aquesta ocasió la secció va d'interrogatius/relatius: ja sabeu, aquelles paraules que a l'anomenada "taula de mots correlatius" comencen per *K*. Són interrogatius quan estan en una pregunta i relatius quan tenen relació amb un element anterior al qual substitueixen. I per il·lustrar-los amb una mica d'humor (?), uns quants acudits.

Comencem per *KIO* (què), que quan cal porta la *N* d'acusatiu (objecte directe):

- *Kelnero, kio estas tio, kion vi portis? Teo aŭ kafo?*
- *Je kio ĝi gustas?*
- *Je malpura akvo!*
- *Tiam ĝi estas kakao.*

Fixeu-vos també en l'ús de la preposició-comodí *JE*. Com que cap altra sembla que vagi bé per expressar "De què té gust?", doncs fem servir aquesta.

Ara afegirem *KIU* (qui, quin/a) Alguns *komencantoj* es pensen que *KIU* es fa servir només per a persones, però no és així: *KIU* (i la resta de compostos de

*IU*) serveix tant per a persones, com per a animals o per a coses.

- *Panjo, hodiaŭ, dum nia kemia klaso, ni faris dinamiton!*
- *Tre bone, karulo. Kaj morgaŭ kion vi faros en la lernejo?*
- *Lernejo? Kiu lernejo?*

A continuació, una de fàcil: *KIE* (on), per parlar de lloc:

*En biblioteko:*

- *Kie vi havas la libron Viroj: idealaj amantoj kaj kunuloj?*
- *En la sekcio III: Mitoj kaj legendoj.*

- *Kie vi naskiĝis?*
- *Kalifornio.*
- *Kiu parto?*
- *Ne, mi tuta.*

Per preguntar la raó, el motiu, fem servir *KIAL* (per què):

- *Se ni manĝas la samon, kial vi estas maldika kaj mi estas dika?*
- *Tio dependas de la konstitucio.*

- *Kaj kiu artikolo de la konstitucio diras, ke mi devas esti la dika?*

Per la seva banda, *KIEL* (com) serveix per demanar per la manera:

- *Kiel nomiĝas tiu monto?*
- *Kiu?*
- *Kaj tiu alia?*
- *Panjo, kiel oni faras Koka-Kolaon?*
- *Tio estas sekreto, karulo.*
- *Bone, mi diros al neniŭ, sed kiel?*
- *Eva, mi malkovris, ke vi havas amanton!*
- *Kiel vi povas scii tion?*
- *Pro etaj detaloj: mi ĵus trovis cigaredstumpon surplanke, botelon de biero en la rubujo... kaj nudan viron en nia lito!*

En aquest últim fixeu-vos que, com que era a la gallada de les escombraries, el que ha trobat l'home és una botelo *de* biero, l'envàs

buit; i no una botelo *da* biero, l'ampolla plena.

Si el que volem és demanar per la quantitat, hem de fer servir *KIOM* (quant). Si va acompanyat d'un nom, aleshores afegim la preposició *DA*. Compareu "Kiom vi trinkis?" (Quant has begut?) amb "Kiom *da* vino vi trinkis?" (Quant vi has begut?):

*Geparo vespermanĝas en restoracio dum sia unua rendevuo:*

- *Kun kiom da viroj vi estis ĝis ĉi tiu nokto?*
- *Kun tri.*
- *Bone, tri ne estas tro.*
- *Jes, hodiaŭ mi havis trankvilan tagon.*

Per acabar, un de més difícil: *KIES* (de qui), que es fa servir per demanar sobre la possessió. Cal recordar que es posa davant de l'objecte: "Kies domo estas tiu?" (De qui és aquella casa?)

- *Ĉu vi kredas, ke post la morto ekzistas alia pli bona vivo?*
- *Tio dependas. Post kies morto? ■*



# POEZIO

**Viktoro Solé**  
Muzikinstruisto

**K**iam mi ankoraŭ ne ekstudis Esperanton, sed la ideo jam konvinkis min, Esperanta beletro, kaj ĉefe poezio, ŝajnis strangaj al mi: “Esperanto estas komunikilo, do ne komplikilo la aferon, bonvolu!” stulte mi pensis. Tamen, ekler-ninte la lingvon, ia magio kaptis min kaj tuj mi ĝuis la muzikon de la kuniĝo de radikoj kaj sufiksoj, kaj miris pri la ĵonglado de vortoj enfraze. “Nu, la zamenhofa lingvo ne estas nura komunikilo”, mi pensis tiam, ŝanĝinte mian menson.

Vi eble jam aŭdis tiun ŝercon en Esperantaj rondoj:

- Kiam vi komencis lerni la lingvon?
- Nur antaŭ du monatoj.
- Ho bone, kaj kiom da esperantaj poemoj vi jam verkis?

Kiel komencanto, mi povus esti unu el la partoprenantoj de tiu bablado, ĉar ankaŭ mi mem verketis kelkajn (nemon-trindajn) versojn. Multaj homoj pensas, mi inter ili, ke tio, kion oni ne kapablas fari sufiĉe bone en sia –ni diru– normala vivo, magie pliboniĝas en esperantaj rondoj. Tial ni havas tiom da *kuraĝaj* kantistoj, muzikistoj, dancistoj, ĵonglistoj, prelegantoj, instruistoj kaj eĉ poetoj.... Tamen la esceptoj estas elstaraj. Tiuj, kiuj vere profitas la artajn trajtojn de nia amata lingvo ja kapablas vere poezii per ĝi kun rezultoj fojfoje kompareblaj al la liriko de la grandaj naciaj poetoj.

Do, mi iom-post-iom komencis legi unue la plej malnovajn poetojn. Kompreneble la poemojn de la majstro (*Pluvas kaj pluvas kaj pluvas / Senĉese, senfine, senhalte*), **mirinda provizejo** de devizoj, kiuj fondis la esperantan kulturon (*Eĉ guto malgranda, konstante frapante, / Traboras la monton granitan; La nepoj vin benos; Ronda familio; Pacaj batalantoj...*). Poste mi malkovris la poemon *Lasta kiso* de Edmon Privat: *Flugiloj viaj kvazaŭ lampo / briletas en nebulo: / vi kion serĉas tra la kampo, / perdita somerulo?* “Perdita somerulo”, kia naiva beleco!

Unu el niaj gigantoj, sendube estas Kálmán Kalocsay (*Poeto sen popolo, ho animpresa scio, / Ke surdas la oreloj por ĉiu mia voko... / Fonsonos senresone la plora melodio, / Kiel ŝirita kordo en forlasita loko*). Kaj kio pri la bonkora kaj senkonsola Marjorie Boulton? (*Ridi kun vi, paroli kaj diskuti, / vortludi, legi kune, kara; poste / dum vi parolas, trankvilege muti / dum via voĉ’ karesas min ĝisoste...*).

Imponaj poemoj ne mankas nialingve, kiel *La infana raso* de William Auld (*Ekstere ŝvebas la astroj. Lumorapide / Traarkas ni la vakuon, tamen ni ŝajnas / Senmovaj sur mondo malgranda kiel polvo, / Kie la tempo, homa kreaĵo, mortis*) aŭ la *Poemo de Utnoa* eposo de nia Abel Montagut (*Unu rondiron plenan la luno vele navigis / kaj iompostio me la ĉarpentado progresis. / La ŝipo profiliĝis kaj ripoj kornis aeren / dum ili laboradis senĉese, fide, tenace*). Alia koloso estas Baldur Ragnarsson, poeto,



Unu el niaj gigantoj,  
sendube estas Kálmán Kalocsay.

kiu bildigas Islandon en ĉiuj siaj poemoj (*Absolute kvietaj, kvazaŭ ŝokitaj, / tremetas preskaŭ neperceptebla / la restantaj folioj de l’ arbetoj / post l’ unua frostonokto*).

Ni ankaŭ menciu la fekundan Jorge Camacho, kiu arte vortĵonglas (*Ne ĉio pensubla penseblas. / Ne ĉio dirubla direblas. / Ne ĉio dirunda dirindas*) kaj nepre ne forgesu pri nia laŭreata poeto Nicolau Dols (*Blovas la vento fortege tra branĉoj abiaj kaj ŝajnas / kvazaŭ hodiaŭ la suno finvenkos mallumon silentan*). Kaj ni finu per unu el la plej belaj poemoj, kiun mi iam ajn legis: *Tempo* de Miguel Fernández. Ĝi havas vere esprimovan komencon, kiu bildigas majstre la titolon de la poemo: *Io, malgraŭe, gvatas la ekstazon / de somnola salono / dezerta, muta, milde trasagita / de prujne pura strio sunradia*. Kaj ties fino estas kvazaŭ pugnobato: *Praa dio, / ido-vora kastrinto de l’ ĉielo... / Estas la tempo, / tia kancera formo de la morto*.

Legu poezion, eĉ en Esperanto! ■

LA PLEJ BONA KOMPANIO ESTAS LIBRO, REVUO AŬ DISKO



# BUTIKO\*

[butiko.esperanto.cat](http://butiko.esperanto.cat)



Serĉu kaj aĉetu vian libron, revuon  
aŭ diskon en nia retbutiko

Cerca i troba el teu llibre, revista  
o disc a la nostra botiga en línia